



ESPERANTO

M A J O 1 9 6 1

esperanto

M A J O 1 9 6 1

5 4 a J A R O

REVUO INTERNACIA

N-RO 666 (5)

Fondinto : H. HODLER

Ĉion por la redakcio oni sendu al la Redaktoro : W. Auld, 35 Deer Park, Sauchie, Alloa, (Clackmannanshire), Skotlando.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-2, Nederlando. Telefono : (010) 128313. Ĝirkonto : 378964 TELEGRAMADRESO : ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A. :

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Traduko kaj represado de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Jara abono (1961) : 11,50 gld. (kun membreco kaj jarlibro 15,— gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo 128,— gld, 1/2 paĝo 64,— gld, 1/4 paĝo 32,— gld, 1/8 paĝo 16,— gld, 1/16 paĝo 8,— gld.

Anoncetoj pri korespondado :

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu du da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 80 landoj.

Estraro de U.E.A. :

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto kaj aganta prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

Prof. D-ro Hideo Yagi, vic-prezidanto, 76 Kawaramachi, Okayama, Japanujo.

E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Norman R. Smith, estrarano pri kulturaj aferoj, 75 South Ealing Road, South Ealing, London W 5, Britujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri eŭropa lingvo-kampanjo, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

A. Rajski, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odyńca 3/5, Warszawa, Pollando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono : ARNold 90-81.

Serva Centro : ĉe Mag. Bruno Keppeler, Place Longemalle 16, Genève, Svislando (provizora adreso).

LA FRONTPAĜA BILDO :

Sur fama lageto Serpentine en Hyde-Parko, Londono, boatas havaja kantistino Jama Saki. Londono - urbo de la Antaŭkongreso de la 46a U.K. (Vd. p. 90-91).

Enhavo

Generalo Louis Bastien	81
Esperanto kiel literatura lingvo III	82
Feliĉan novan jaron !!	84
Paŝu tra la limregiono	87
Ni mem kulpas	88
Krucvortenigmo	88
De Londono tra Harrogate ĝis Skotlando	90

Rubrikoj

La Internaciaj Konkursoj	87
Nia Forumo	89
La Juna Vivo	92
Ŝaka Rubriko	93
Radio kaj T.V. Babiloj	93
Tra la Mondo	95
46a U.K.	96
Oficialaj Informoj	98
Radio	98

Manuskriptoj por "Esperanto" estu liveritaj al la redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare tajpitaj en perfekta Esperanto. Oni skribu sur nur unu flanko de la papero (prefere en normformato A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa margeno maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto. Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn supersignojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

Generalo Louis Bastien

In memoriam


Unu el niaj plej meritaj pioniroj, intendanto-generalo Louis Bastien, Honora Prezidanto de UEA, mortis la 10-an de aprilo en la aĝo de 91 jaroj. Per lia forpaso nia movado suferis gravan perdon.

Dum sia longa vivo li kontribuis al Esperanto en plej diversaj manieroj kaj medioj. Antaŭ preskaŭ 60 jaroj li lernis nian lingvon. Dum 50 jaroj li apartenis al la Lingva Komitato resp. Akademio de Esperanto. Siajn eminentajn lingvosciojn li montris en pluraj verkoj, inter kiuj Naŭlingva Etimologia Leksikono estas la plej konata. Sed la ĉefverko estas lia aktiveco je la estrado de la internacia Esperanto-movado.

Generalo Bastien, dum multaj jaroj energia kaj talenta pledanto por Esperanto en Francujo, nur en la jaro 1934 ekludis aktivan rolon en UEA. Novelektita komitatano li unuanime estis elektita ĝia prezidanto. Konstatinte ke la situacio de la asocio, aparte ĝiaj financoj, ne estas kontentiga, li ne rezignis sian postenon sed kuraĝe kaj energie ekagis por sanigi la aferojn. Ĉar mi je la sama tempo fariĝis estrarano, mi povis de interne vidi liajn eksterordinarajn klopodojn. Baldaŭ la situacio pliakriĝis, kiam li konstatis, ke radikalaj ŝanĝoj estos necesaj por savi la malfortan asocion.

Estas vere strange, ke ĝuste generalo Bastien, tiu nobla, varmkora kaj ekvilibre sobra persono, devis transpreni la pezan rolon de prezidanto dum tiu kriza periodo. Mi scias, kiel li malĝojis pro la tiama malpaco inter la esperantistoj, kiel li penadis por trovi kontentigan solvon de la organiza problemo. Kvankam li suferis de kormalsano, kaj tial volis kiom eble plej baldaŭ retiriĝi de la prezidanta posteno, li decidis resti ĝis atingita unueco kaj harmonio en nia movado. Malfeliĉe la granda milito intervenis kaj dum pluraj jaroj izoligis lin

kaj haltigis liajn strebadojn. Sed kiam la milito estis finita, li rekomencis sian laboron kaj fine atingis la celon. Mi memoras, kun kiom da ĝojo li salutis la novorganizitan unuecan Universalan Esperanto-Asocion en la jaro 1947. Kaj ankoraŭ mi vive memoras la kortuŝan momenton, kiam li en sia adiaŭa parolado diris al la granda kongresanaro: "Esperanto venkos, kondiĉe ke la esperantistoj bone kunlaboros. Tial mi admonas vin: Estu toleremaj!"



Generalo Bastien estis eminenta prezidanto. Li kapablis lerte kunordigi la diversajn opiniojn. Neniam li trudis siajn ideojn al aliaj, sed per objektiva prezento de faktoj klarigis la situacion kaj lasis la decidon al la komitatanoj kaj estraranoj. Neniam li facilanime akceptis iun proponon, sed ofte admonis la kunlaborantojn antaŭ la decido atente pristudi la problemon el diversaj vidpunktoj kaj pripensi la sekvojn kaj konsekvencojn.

Generalo Bastien havis admirindajn karaktertrajtojn: Li estis bonhumora, ŝercema kaj fidela amiko. Kaj lia ofero al nia afero, ankaŭ finance, estis grandstila. Sed neniam li fanfaronis pri tio, eĉ al la kolegoj en la estraro li nenion malkaŝis.

Ne estas mirinde, ke la kunlaborantoj alte taksis lin. Kaj persone mi konfesas, ke kvankam mi jam je la unua renkontiĝo ekhavis grandan respekton, simpatian kaj ŝaton al li, tiuj sentoj kreskis de jaro al jaro.

Pasis multaj jaroj post lia eksigo kiel prezidanto. Sed li daŭre konservis leterrilatojn kun siaj amikoj. Kvankam dum la lastaj jaroj preskaŭ tute blinda, li ne ĉesis atente sekvi la evoluon de nia movado, kaj varme aplaudis ĝiajn sukcesojn.

Estas doloriga penso, ke tiu nobla, grandanima personeco ne plu troviĝas inter ni. Sed lia verko restos por ĉiam en la historio de Esperanto.

Ernfrid Malmgren

ESPERANTO KIEL LITERATURA LINGVO

III

La literaturo de Esperanto oportune dividiĝas en du partojn: verkoj tradukitaj el aliaj lingvoj, kaj verkoj originale verkitaj en la internacia lingvo. Tamen tiu divido estas iom trompa; la du fakoj tiel intime influas sin reciproke, ke ili kune formas unu tutajon. Plurfoje dum la historio de Esperanto okazis akraj disputoj pri la relativa graveco de la du fakoj; iuj deklaris la tradukojn superflujaj kaj vigle defendis la neceson krei imponan originalan literaturon, aliaj bagateligis la provojn de niaj originalaj verkistoj kaj atentigis pri la grava propaganda efiko de gravaj tradukoj. Nu, la esperantistaro havas ĝeneralan emon al superflujaj disputoj, sed tiu ŝajnas al mi unu el la plej superflujaj. Tute senkonsidere pri tio, ke por ambaŭ specoj troviĝas loko kaj merkato inter ni, estas evidente, ke la reciproka influo de tradukoj kaj originaloj levas la nivelon de ambaŭ. La konsciencia tradukanto devas solvi gravajn problemojn de signifo kaj nuanceco, kiujn starigas al li la rigora teksto tradukata; li tial devas esplori ĉiujn latentajn eblecojn de Esperanto, kaj tion ne povas eviti. Nia granda klasika tradukisto, D-ro Kabe, foje tion esprimis jene ¹⁾: "La originala verkisto ĉiam iel povos 'eltiri' sin, li simple ne uzos malfacilajn esprimojn aŭ simple ellasos aŭ aliajn donos". Poste la solvoj kaj eltrovaĵoj de la tradukintoj transiras en la lingvan tradicion, kaj ilin disponas la originalaj verkistoj. Ĝuste pro tio, pluraj tradukoj fariĝis memstaraj klasikaĵoj de la *esperanta* literaturo ("Hamleto", "Sinjoro Tadeo", "Infero", k.a.) — kio cetere okazis ankaŭ en naciaj literaturoj ²⁾. Kaj, ne laste, altnivelaj verkoj tradukitaj en Esperanton starigas nivelon, eĉ normon, sub kiu ne falu la originalaj verkistoj. Aliflanke, la tradukantoj konstruas sian verkon sur fundamento de la kulturo kaj tradicio de Esperanto, kiun starigadas ĝuste la originalaj verkistoj. La nivelo de libera sinesprimo, bazita sur la parolata lingvo, kiun alprenas kaj adaptas al si la originalistoj, starigas kriteriojn al la tradukantoj, de kiuj ili ne rajtas tro malproksimiĝi. La ĉiutagaj esprimoj de la komuna lingvo estas nepre necesaj ankaŭ al la tradukantoj, kaj el tiuj ili ĉerpas.

Se temas pri individua verkisto, la tradukado estas bonega ekzercilo, per kiu li fortigas siajn muskolojn al la originala verkado.

Unu el la taskoj de Esperanto estas, servi kiel tutmonda traduklingvo, ankaŭ por literaturaj verkoj, kaj por tiu tasko ĝi estas aparte taŭga, certe pli taŭga ol la aliaj lingvoj. Ideale, ĉiu iom pli va-

lora verko devus esti eldonita en nur du lingvoj: la originala kaj Esperanto; kaj tiel ĉiu verko grava estas tuj alirebla por ĉiuj popoloj. Pri la valoro de Esperanto kiel traduklingvo mi jam verkis apartan studon ³⁾, kaj al tiu studo mi rekomendas miajn legantojn. Aparte menciinda ĉi tie estas eble tio, ke la internacia lingvo jam nun bonege funkcias kiel "pontlingvo" por tradukado el unu naci-lingvo en alian, ekzemple el la ĉeĥa en la ĉinan, kiam mankas kompetenta konanto de la du naci-lingvoj.

La graveco de nia *originala* literaturo troviĝas en tio, ke ĝi estas la *sola kaj unika* literaturo *internacia*. Ĝi estas eĉ *supernacia*. Trafe skribis Juan Régulo: "Kiam diversaj naciaj lingvoj titolas sin "internaciaj" kaj montras al sia literaturo, ili sofisme preterglitas la fakton, ke tiu literaturo estas *nacia*, sed ne internacia: ĝi estas nome kontribuo preskaŭ senescepte de indiĝenoj, kaj la internacia literaturo de tiuj lingvoj fakte ne ekzistas. Dume en Esperanto ni havas la grandiozan fenomenon de *tutmonda* literaturo demokrate kreita de suverenaj verkistoj de ĉiu lando, el kiu nur sin anoncas la talento" ⁴⁾. En tiu originala literaturo de Esperanto montriĝas la diverslandaj verkistoj, senigite de sia nacieco kaj vestite en sia *homeco*; malaperis la supraĵaj malsimilecoj trudataj de nacilingva etoso, kaj oni vidas tutklare la fundamentan unuecon de la homaro. Mirinde unueca estas la literatura tradicio de Esperanto; pri nia poezio, ekzemple, skribis prof. Waringhien: "...mi ne konstatas profundan ŝanĝon en la periodo, kiu iras de 1921 ĝis hodiaŭ: nuancojn de tono, jes — sed tio simple kondukus nin al distingo de unu hungara skolo, kiun sekvis, kvankam sen la kutima interbatalado inter du sinsekvaj skoloj, la skota skolo." ⁵⁾ Verkante per la internacia lingvo, por internacia legantaro, partoprenante en supernacia kulturo kaj tradicio, la verkisto vole-nevole (sed plej ofte vole) esprimas ideocon kaj idealon tuthomajn, alireblajn por ĉiuj homoj senkonsidere pri nacieco. Individuo kelkfoje tion bedaŭris; la profunde naciisma angla verkisto K.R.C. Sturmer, kiu fakte neniam sukcesis liberiĝi de siaj naciaj apartaĵoj, pli ol unu fojon esprimis fortan bedaŭron, ke per Esperanto ne eblas sentigi la sukajn nuancojn de klaso, regiono kaj slango esprimatajn de la angla lingvo. Li sentis tion kiel mankon de la internacia lingvo. Sed laŭ mia opinio li eraris: tio ja ne estas tasko de la internacia lingvo, sentigi distingojn interne de iu nacio; kaj sekve oni ne devas riproĉi al Esperanto, ke tiun taskon ĝi ne plenumas. Ĉu la tasko de Esperanto ne estas ĝuste, sentigi simile-

¹⁾ Literatura Mondo, 1931, p. 144.

²⁾ La Biblio estas evidenta ekzemplo de tio ĉi, sed ne escepta. Anglalingvanoj pensu ekzemple pri la traduko el Rabelezo de Urquhart.

³⁾ Memorlibro pri la Zamenhof-jaro, 1960, pp. 54-67.

⁴⁾ Memorlibro pri la Zamenhof-jaro, p. 70.

⁵⁾ La nica literatura revuo, kvara jarkolekto, p. 95.

con, kaj ne malsimilaĵojn, de la homoj? Ĉu unu tasko de la esperantistoj ne estas, traduki el la esperanta literaturo nacilingven, ĝuste por montri tiun similecon (kiun plejofte kaŝas ĝuste la lingvaj malfacilaĵoj) al la nacioj?

La esperanta literaturo trapontas la naciecojn, same kiel la esperanta lingvo mem estas *la gramatika bazo por la internacia vortprovizo*. Hugh Macdiarmid, al kiu ni jam aludis en la dua parto de tiu ĉi studo, iam skribis:

"Eĉ tiuj, kiuj hodiaŭ estas la ĉefaj subtenantoj de Basic English, kvankam ili pretendas koni ĉiujn proponojn pri neŭtrala helpa lingvo, lerte kaŝas sian konon kaj donas neniun impreson pri la grandega elmontrado, kiun Esperanto jam dum duona jarcento prezentis.... Aliflanke Prof. Richards, ekzemple, malkaŝas, aŭ pli ĝuste elmontras, tiun mirindan insulecon pri kiu fieras la anglasaksa menso. Li konscias pri la problemo kaj klare priskribas ĝin: "Ĝi (t.e., komuna lingvo) devas eviti ĉiun minacon al la ekonomia, morala, kultura, socia aŭ politika stato de iu ajn persono aŭ iu ajn popolo. Ĝi devas ne havi iun ajn nuancon pri intelekta, teĥnologia aŭ alia superregado. Neniu kiu lernas la mondlingvon devas havi la plej etan kaŭzon senti eĉ nur nebulete, ke li submetiĝas al fremda influo aŭ estas tiritita sub la potencon de aliaj grupoj." Poste li proponas precize tion, kion li mem tiel senkompromise kondamnis, ĉar la akcepto de la angla kiel la supernacia lingvo implicus akcepton de anglasaksa superregado. Tion pruvas la fakto, ke ĉiuj argumentoj proponitaj de Prof. Richards kaj ties kolegoj baziĝas sur niaj multnombraj superecoj: ni estas pli riĉaj, pli multnombraj, pli civilizitaj, pli virtaj, ol aliaj! Oni devas ekzorci ĉiujn imperiismajn revojn, inkluzive lingve imperiismajn, kiuj sumigas ĉiujn aliajn. Plej bone estus utiligi la metodon de Basic English, ne por la angla lingvo, sed por la vasta internacia vortaro jam ekzistanta".⁶⁾

Estas malĝojige, ke tia klera kaj relative klarvida homo ne povis ĝis nun kompreni, ke lia konkludo en si mem ne estas ebla, ĉar ĝuste la metodo de Basic English estas limigo de la vortaro, kaj sekve ne utilis ĝin apliki al la — kiel li mem diras — *vasta internacia vortaro*! Estas eĉ pli malĝojige, ke li blinde ne konstatas, ke Esperanto estas precize tio, kion li serĉas: utiligo de la vasta internacia vortaro, sur la bazo de raciigita gramatiko!

Sed tiu nia unika internacia originala literaturo, — kiel ĝi nun statas? Ĝis kia grado ĝi estas plenumo, ĝis kia grado ankoraŭ nur promeso? Oni povas diri ke la esperanta poezio estas plenkura, egala al aliaj poezioj. Tamen la dramo ĉe ni apenaŭ ekzistas. La manpleno de dramaj verkoj ne atingis atentindan nivelon; sed tio ne estas miriga, ĉar antaŭ ĉio dramverkisto bezonas teatron, kaj la vivantan tradicion de tia teatro, kaj tio fakte ĝis



En la Esperanto-programo de la Voĉo de Ameriko, la 17-an de Marto 1961, Membro de la Usona Domo de Reprezentantoj, Kongresano Roman Pucinski el Chicago (maldekstre) respondis al demando de Membro de la Unua Ĉambro (Senato) de la Sveda Parlamento, S-ro Einar Dahl, pri tio, kion la Kennedy-registaro faras por forigi la senlaborecon. Kongresano Pucinski parolis jam la trian fojon en Esperanto-programo de la Voĉo de Ameriko. Nia bildo montras lin kun Senatano Ralph Yarborough el Texas, kiu ankaŭ parolis en Esperanto en unu el la programoj de la Voĉo de Ameriko. Aliaj membroj de la Usona Kongreso, kiuj parolis en Esperanto en similaj radio-programoj, estas Kongresanino Marguerite Stitt Church el la Ŝtato Illinois (kiu ankaŭ respondis al demando de Senatano Dahl) kaj Kongresano Silvio O. Conte el la Ŝtato Massachusetts. Sinjoroj Yarborough kaj Pucinski estas Demokratoj: Sinjorino Church kaj sinjoro Conte estas Respublikanoj.

nun mankas al ni, kvankam Zamenhof mem antaŭ kvindek jaroj proponis starigon de internacia teatrotrupo. Nia novelo atingis maturecon; inter niaj majstroj nombriĝas Baghy, Szilágyi, Newell kaj Francis; sed nia romano apenaŭ forlasis la primitivecon. Tiurilate mi pensas pri nacilingva nivelo, kiun ĝis nun ni ne atingis. Mi havas la impreson, ke nur du el niaj romanoj indas tradukon en nacilingvon (kvankam mi bone scias, ke pluraj aliaj jam estas tiel tradukitaj): "Metropoliteno" de Varankin, kaj "Sur sanga tero" de Baghy. Kelkaj aliaj, kvankam interesaj por esperantistoj, ne toleras komparon kun la meza nacilingva romano. Tamen jam maturiĝas la tempo, kaj mi opinias, ke baldaŭ leviĝos nia unua granda romanisto. Sur kampo de beleto, ni havas nian Waringhien, kies eseoj meritas tradukadon, sed kie troveblas nia dua?

Entute ŝajnas, ke nia literaturo normale evoluas, multon plenumis kaj ankoraŭ pli multon promesas. Jam hodiaŭ, pro ĝia poezio kaj noveloj, indas studi Esperanton por ekkoni ĝian literaturon.

(Finota)

WILLIAM AULD

⁶⁾ In Memoriam James Joyce, p. 61-62.



FELIĈAN NOVAN JARON!!

Salvador Gumá

Filo de kamparanoj, li amis sian teron; sed la grundo estas tiel malalta kaj la fosilo tiel peza... Vere doloris ofte al li la lumbo pro la konstanta kurbiĝo. Tie brilas gaje, bele la suno, sed ĝi rostas la dorson kaj preskaŭ ŝveligas la kapon per siaj varmaj penetraj radioj. Surkampe estas tre pura aero, sed ofta ventado necesigas rezistemon, kva-zaŭkoleran teniĝon. Ĉu urbanoj ne vivas pli oportune? Ne en koto ili paŝas, sed sur pavimitaj stratoj, kaj vole aŭ bezone ili uzas veturilon. Urbanoj ĝenerale vivas en alfarita klimato, for de la natura akreco.

Tiaj konsideroj naskis al li ideon: Iri en urbon, resti tie, urbaniĝi; sed kiel? Pense li alparolis ĉiun konaton, kies enurba rolo povus helpi lin per aŭtoritato aŭ influo. Li traesploris la eblajn oficojn: Tramisto, poŝtisto, rubiŝto.... Facile li imagis, ke la unua povas kaŭzi akcidentojn, do tro danĝera. La lasta ankaŭ kurbigas la dorson pro la senfine levataj rubuoj. La meza ŝajnis al li la plej taŭga. Ĉu li mem ne ŝatas ĉasadon, do longan paŝadon? Kio do pli bona por li ol esti poŝtisto, en la fako de leterportado? Iri en uniformo surstrate de domo al domo, liveri al iu fraŭlino sopiratan letereton de ŝia amato kaj eventuale ricevi trinkmonon pro tiel favora cirkonstanco, ĉiam iri stare kiel decas al homaj homoj, ne kurbiĝe kiel perfekta urso.... Post la ideo venis la decido. Li planis al sia edzino:

— Mi skribu al S-ro Komandanto, kun kiu mi soldatservis; videble li ŝatis min. Vi skribu al Moŝto Episkopo, vi ja estis longe ĥoristino en la preĝejo!

Kiel fariĝis? Neniam li povis scii kies estis la

helpo, sed li jam estas poŝtisto, disportas leterojn, traktas afable la personojn, kaj . . . ĝojas.

Ĉiujare, laŭkutime, okaze de la tradiciaj Jarfinaj Festoj, la publikaj funkciuloj prezentas bondezirojn al rilatataj personoj. Ne estas dubindaj iliaj bonaj sentoj, sed la celo estas alia: ricevi gratifon ankaŭ laŭkutime donatan. Tiel, nia poŝtista familio — geedzoj kaj filineto — ricevis sume kroman monatsalajron.

Tiel sukcesa jarfino malfermis helan horizonton antaŭ Nova Jaro. La Vivo renoviĝas, ni renovigu la nian! — ili diris al si. Kaj rigardante la murojn de sia loĝejo, — modesta, surtera apartamento — ili rimarkis ke la tempo forviŝis la kolorojn; ke kelkaj ornamaj kurtenetoj jam flavetiĝis; ke mankas pentraĵetoj surmure por lukse agrabligi la aspekton; ke la tableto de la filino (donacita de la avino) estas ekstermoda, pratempa . . . La plano estis preta koncerne la hejmon, sed ne koncerne la korojn. Estis necese festi kaj prifesteni la unuan tagon de la jaro, la stafeton de renoviĝo; celebri la feston gaje kun parencoj aŭ amikoj; danci, danci, trinki kaj maldormi.

Tiu proverbo, laŭ kiu "Inter diro kaj faro estas granda baro", estis tute ne efika. Urĝe oni farbis la apartamenton, la edzino ŝanĝis la kurtenojn, aĉetis novan tableton por la filino, reordigis ĉion en la ŝrankoj, frotis la meblaron ĝis briligo, ĉion senpolvigis kaj novaj kadritaj bildoj jam pendis surmure. Antaŭ Nova Jaro decas renovigo, ne nur en hejmo sed ankaŭ en koro: la edzo prezentis al ŝi donacon: Vazon kun bela bukedo el artefaritaj floroj, kiel simbolon de nevelkonta amo.

Al kalendara arbo restis nur unu folio: 31a de decembro. Por tiu transira nokto, estis aranĝita Granda Balo en riĉula societo "La Progreso".

— Ni invitu mian fratinon, — ŝi diris — kaj ankaŭ mian kuzinon.

— Jes, ja! — li respondis —.

Ĉar tiuj fraŭlinoj loĝis ekster la urbo, estis necese antaŭprepari liton por ili. La edzino serĉis solvon, ĉar kroman liton ŝi ne havis: la fraŭlinoj dormu en nia granda lito, la edzo kaj mi en tiu de la filino, la filinon mi gastigu ie, ĉe najbarino. Ĉu mi ne trovos bonvoleman sinjorinon, kiu gastigos mian filineton dum unu sola nokto por ke ni festu la venon de la Nova Jaro?

Sed matene en la feliĉa projekto aperis nubeto: — Mi ne sentas min bonfarta — diris la edzino. Ŝajnas ke la gripo, nun tiel vastiĝinta tra la tuta urbo, venis al mi; sed, ĉar turmentis ŝian koron la penso, ke tial ili devus resti hejme, ŝi volis supozi ke eble tio estas nura malvarmumeto. Tial ŝi venis senhezite al apotekisto.

— Jen piloloj, sinjorino, kontraŭ gripo, malvarmumo, kapdoloro, febro . . . Glutu po du, unu ruĝan kaj unu verdan, trifoje dum la tago.

— Kurioze!! — ŝi diris baldaŭ. Jen mi jam fartas bone, ni povos festi, mi iras telefoni al mia fratino.

Vespere la fraŭlinoj estis jam venintaj. Kune ili manĝis kaj ĉampano gajigis ilin.



— Ĉu vi estas jam pretaj por la Granda Balo? — diris la edzo —

Sed la fraŭlinoj ne iras iel ajn al dancejo. Ili trarigardis sin de haroj ĝis ŝuoj ĉar ili bone sciis, ke balo estas ia foiro, kie valoras gracio pli multe ol mono. Ne estas strange do, ke ili rimarkis jupan ĉifaĵon.

— La gladilon, fratino, por momento ni petas . . .

Kaj lastmomente la fraŭlinoj gladis la jupon, dum la horloĝmontriloj rapide avertis, ke estas jam tempo iri al la "Progreso" por honore akcepti la Novan Jaron.

— Ĉu vi estas jam pretaj? — rediris la poŝtisto.

— Tuj, tuj . . .

Ili haste surmetis la jupon kaj kune rapidis al la Societo. Dume, la elektra gladilo restis en la ĉambro, mallume, sur la nova ĵus aĉetita tableto de la knabino. En la granda salono de la "Progreso" eksonis orkestro trenanta la ĝojulojn al turniĝado. El trumpetoj eliĝis orelŝiraj sonoj, el tamburoj ritmiga taktado, el violonoj dolĉa invito al balanciĝaj movoj.

— Feliĉan Jaron!! — ekkriis iu en la salono.

— Feliĉan Novan Jaron!! — ĥore respondis la ĉeestantaro.

La horloĝaj manetoj preterpasis ronde kaj rapide la ciferojn. Feliĉa vivo estas mallonga. La tempo flugis nerimarkite en la kapturniga moviĝo de la bruanta salono, kaj ankaŭ flugis en la sen-

brua ĉambro, kie forgesite kuŝis la neaŭdeble kraketanta kaj pluvarmiĝanta gladilo.

— Bonan Jaron ! Feliĉon al ĉiu !

La gladilo tute ruĝiĝis. Ratoj en silento rodas per dentoj, kaj la gladilo, sendenta "apa-rato", rodas per fajro. Fume karbiĝis la supra tableto-tabulo. Iom post iom la ardaĵo prosperis. Karbiĝis la tuta tableto, plena leda libroteko de la knabino, la karbigoblaj partoj de knabina biciklo : selo kaj kaŭĉukaj radoringoj. Densa nigra fumo torente eliĝis el la ĉambro. Brulis fleksebla tablolampo, brulis tolaĵo, brulis surmure pendantaj pentraĵoj, brulis eĉ la brila gladilo, kies tenilo vaporiĝis, kies elektra ŝnureto brulinte kontaktigis la fadenojn kaj ĉesigis la kurenton. Ĉesis la kurento sed ne la fajro. Ankaŭ ne la homa svarmo en la salonego, kie varmigitaj de varmo kaj vino kaj ardaj deziroj kirliĝadis homaj paroj ĝojantaj pri la pasintaj tricent-sesdek-kvin zorgoj kaj dezirantaj tricent-sesdek-ses feliĉojn al si reciproke. Paralele kirliĝadis ankaŭ la kvarobla fumo de ligno, de ledo, ŝtofo kaj kaŭĉuko. La fumnubego plenigis la tutan loĝejon; nigriĝis la novigitaj muroj, nigriĝis la reaĉetitaj kurtenoj, ankaŭ la mebloj. La fumo enpenetris la ŝrankojn kaj grase-nigre malpurigis ĉion.

— For la zorgojn !! Vivu la Feliĉeco !! — Plusonis en la salono.

Longe post noktomezo daŭris la festado. Preskaŭ senĉesa dancado, huraoj al Nova Jaro, longaj interbabiloj kaj maldormado lacigis ilin. Antaŭkrepuske — ĵus sonis la kvinia horo — ili reiris hejmen. La gladintaj fraŭlinoj, tiel lerte, senĉese dancintaj kun galantuloj, mense vidadis dum reveno la bildojn de la kundancintoj. Jam antaŭ la pordo, ili ne povis rezisti la penson : Tiuj junuloj estis tre elegantaj, ĉu ne ? — ili, diris.

La poŝtisto ĵus enŝovis la ŝlosilon, ŝaltis la lumon, sed vane, lumo ne fariĝis, kaj haladzo plenŝtopis al li la nazon. Sub la ekscitaj impresoj de la festo li ne sciis ĝuste kompreni la kontraston. Kio okazis ? Kvazaŭ blindulo li palpante eniris antaŭsentante katastrofon. Lia koro apenaŭ batis, li apenaŭ spiris. Ĉu fajro ? Tamen, flamojn li ne vidis. Iel li lumigis al si, kaj vidis ĉion, kion vi jam scias !

La edzino plorĝemis kaj svenis; la fraŭlinoj ekploris, la edzo eksplodis kolere :

— Jen, vi senzorgulinoj, vi ne malŝaltis la gladilon, en via kapo loĝas birdido ! Vi nur scias primemori la bildojn de viaj galantuloj !

Tia ofendo incitis ilin, kaj tiel gaje kunfestinte ili komencis reciprokan parolatakadon per insultoj paralele kreskantaj ĝis la plej fia esprimo. Dume la edzino rekonsciiĝis kaj provis eviti propran kulpecon :

— Ja, ŝajnis al mi, ke ni devis resti hejme. Mi ne fartis tute bone, sed por komplezi vin — turnante sin al edzo — mi penis ĉiel

— Fripona edzino ! Ke vi ne deziris festi ? Kiu do ĉion aranĝis ? Kiu iris telefoni kaj inviti viajn fratinon kaj kuzinon ?

Forgesinte la donacitan florbukedon, kiu simbolicis nevelkontan amon, li sakre murmuris al ŝi ĝis ŝi ankaŭ ellasis malbenojn, ĉar ĉu ne li planis la feston ?

Je tagmezo venis al ili la avino.

— Jen, kara panjo, — diris la edzino intencante ricevi ian monhelpon — kiel ĉio nigriĝis, kiel forbrulis la tableto, la portreto de nia filino, la ...

— Silentu jam, kion do vi babilas ? — diris la avino — ĉu vi mem ne estas plej kulpaj ? Vi meritis multege pli. Por kio taŭgis mia ekzemplo ? Bonaj, decaj geedzoj nokte restas hejme kaj ne aspiras mondumecon. En via aĝo, ĉu vi estas birdidoj ? Kia moralo, nuntempe, en nia tempo tio ne okazis !

Riproĉate, neniuj estas kontenta; ankaŭ ne ŝi. La edzino penis pravigi sin, sed tial plikoleriĝis la avino, kiu sekve duobligis la riproĉon, antaŭvidante en sia penso tutan forbrulon. La filino abrupte respondis;

— Estas bedaŭrinde, patrino, ke vi venis. Por tio ni ne bezonis vin. Iru jam hejmen !


La poŝtisto staris malserene apud la pordo surstrate, celante liberiĝi de la internaj impresoj. Lia mieno klare montris ke gravaj zorgoj okupas lin. Li estis silenta, senmova, fiksrigarda. Sur lia modesta ekonomio estis tre grava perdo la brulaĵo, sed ne tio maltrankviligis lin. Frostan traskuon li sentis pro la penso, ke katastrofo estis preta : Se ili estus lasintaj la filinon hejme, ŝi estus jam sufokita de la fumo ! Se pro eĉ nura venteto enpenetrus aerfluo, fajraj flamoj cindrigus la hejmon, la domon kaj verŝajne ankaŭ la infanon ! Poste, sen hejmo, sen filino, sen mono, kvazaŭ krimulo Kia kontrasto ! Ĵus ni ĝoje dancadis; nun, mi baraktas kontraŭ la Morto, kaj

— Poŝtisto, Poŝtisto ! Bonan, feliĉan Novan Jaron !

— Alvokis gaja najbarino preterianta.

Jes bonan kaj feliĉan

(Premiita en la Belarta Konkurso, 1960)



La urbestro de La Laguna, (Tenerifo), decidis nomi novkonstruatan straton "D-ro ZAMENHOF". La inaŭguro okazos, kiam la konstruata domo (dekstre) estos preta. La strato troviĝas tute proksima al la konata eldonejo STAFETO.

Paŝu tra la limregiono

Vidu Skotlandon havante unu piedon en Anglujo

Transirante la landlimon el Anglujo en Skotlandon vi ne bezonas pasporton — ne ekzistas dogano, nek eĉ gvardiano kun ponardego aŭ ŝultra pafarko por montri, ke vi preterpasas tiun lokon kiu estis, dum jarcentoj, landlimo pro kiu oni multe batalis. Vi vidos la sovaĝajn erikejojn, la verdajn rondformajn montetojn, la riverojn en kiuj la trutoj naĝas super la gruzo kaj la salmoj saltas, grizaspektajn urbetojn kaj amikajn homojn.

Plejparte, la landlim-militado finiĝis antaŭ 350 jaroj kiam la reĝolandoj de Anglujo kaj Skotlando unuiĝis sub la skota James (Jakobo) — la unua reĝo tiel nomita en Anglujo kaj la sesa en Skotlando — kvankam kompreneble la esperoj kaj la tragedioj de la "Jacobite Stuart" — movado ne transiris la limon ĝis pli ol cent jaroj poste. Pli frue tamen, ekde la tagoj de la Romianoj, ĝi estis la interlimo kaj batal-kampo de la nordo kaj la sudo kaj en ĝi sumiĝas multe de la historio de Skotlando kaj Anglujo.

Venu al la "Borders" preta por vidi tutan gamon da impresaj, kaj plej grave, venu havante plurajn tagojn liberajn, ĉar ekzistas ĉi tie multe da vidindaĵoj. Aŭtomobilo estas memevidenta avantaĝo, sed aŭtobus-servadoj veturigos vin tra la limregiono el Edinburgo, Glasgovo kaj la plimultaj pli grandaj urboj.

Se vi venos de sud-Anglujo kredeble vi vojaĝos laŭ la orienta vojo — la "Great North Road" (granda nord-vojo). Unue vi vidos la muron de Hadriano — la faman fortikaĵon kiu en antikvaj tempoj etendiĝis tute trans la kolo de Anglujo por haltigi la atakantajn Skotojn de la nordo. Grandaj partoj de la muro ankoraŭ hodiaŭ staras, inter Carlisle en la okcidento kaj Newcastle-on-Tyne oriente, kaj ĝi estas la plej fama restaĵo de la romiana posedado de Britujo.

Preter tio, flankeniru por rigardi la kastelojn *Warkworth*, *Alnwick* kaj *Bamburgh* kiuj estis mezepokaj fortikaĵoj de la nobeloj de *Northumbria*. Post tio, vi vidos la Kampon de la batalo ĉe *Flodden* en 1513 — granda venko por la Angloj kaj malfeliĉego al la Skotoj, kies reĝo, James IV, estis mortigita dum la batalo. Fine, forlasante ĉe la maldekstra flanko la *Cheviot*-montaron, kiu konsistigas la plej grandan parton de la nuntempa limregiono, vi alvenos al Skotlando tra *Coldstream*, kiu antaŭ 300 jaroj donis sian nomon al unu el la plej famaj gvardiregimentoj en la brita-armeo — la *Coldstream Guards*. Oriente troviĝas *Berwick*, interesa malnova urbo. La posedado de tiu urbo sanĝiĝis dek tri foje inter la Skotoj kaj la Angloj de 1147 ĝis 1482. Ambaŭ urboj situas ĉe la rivero *Tweed*, kaj kvankam nur sekcio de la rivero konsistigas parton de la landlimo ĝi epitomigas la tutan verdon kaj belecon de la limregiono. Irante almonten vi trovos la belan valon kiu estas senmortigita de generacioj da poetoj. Tie troviĝas la kvar famaj abatejoj, konstruitaj dum la dek-dua jarcento, nome: *Kelso*, *Dryburgh*, *Melrose* kaj, sude, *Jedburgh* apud la valo de la enfluanta *Teviot*. Ĉiuj nun estas ruinigitaj, viktimoj de la militoj dum pasintjaroj.

La historio kaj legendoj jam plenigis nian landon per mil da memoroj.

El *Jedburgh*, Maria, reĝino de la Skotoj, romantike rajdis por viziti sian vunditan amanton *Bothwell* ĉe *Hermitage Kastelo*, 48 km. trans la erikejoj kaj reen. Popollegendoj kaj rakontoj pri sorĉistinoj kaj likantropoj ankoraŭ ne estas forgesitaj, kaj la epopeoj de la pasinteco estas rakontitaj en la malnovaj baladoj kaj kanzonoj.

Ĉi tiu distrikto inspiris la eminentan romaniston Sir Walter Scott, kaj ĝi speguliĝas en multaj liaj verkoj, ekzemple *La Abato* kaj *La Monaĥejo*. La domo de Scott en *Abbotsford* estas malfermita por ĉirkaŭrigardo, kaj la tombo de Scott kuŝas en la belegaj ruinoj de la *Dryburgh*-abatejo.

La plimulto el la bonekonataj literaturuloj de Skotlando loĝis aŭ ĉe la limregiono aŭ en la apudaj graflandoj. Irante laŭlonge de la rivero *Tweed*, denove almonten, ĝis *Peebles*, vi alvenos ĉe la tereno en kiu loĝis *John Buchan*; en la *Pentland*-montareto, sude de Edinburgo, *Robert Louis Stevenson* loĝis dum la juneco ĉe *Swanston Cottage* (dometo), al kiu admirantoj faras pilgrimadojn; kaj okcidente troviĝas la lando de *Burns*, kiu mortis en *Dumfries*, ĉefurbo de la plej okcidenta lim-graflando *Dumfrieshire*, kaj naskiĝis ĉe *Alloway* en *Ayrshire*.

Tamen, la plej fama loknomo en *Dumfriesshire* estas *Gretna Green*, kiu dum jarcentoj estis la celo de fuĝantaj anglaj geamantoj. Laŭ la antikva Skota leĝo — kiun oni ŝanĝis en 1940 — nur necesis, ke paro solene deklaru pri siaj deziroj geedziĝi, antaŭ atestantoj, por laŭleĝe geedziĝi — tial tiuj kiuj ne estis plenaĝaj, kaj ne povis akiri la konsenton de la gepatroj, fuĝis trans la limon. La forĝejo ĉe *Gretna Green* sinonimiĝis kun romantikaj amforkuroj, kaj miloj da vizitantoj ankoraŭ haltas tie por ĉirkaŭrigardi la forĝejon kaj la muzeon.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1961

Stato je la 31-a de marto

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Britujo	6688	5860	87,62
2.	Finnlando	2515	2095	83,30
3.	Svedujo	6325	5260	83,16
4.	Nederlando	5716	4597	80,42
5.	Svislando	2120	1665	78,54
6.	Belgujo	2121	1539	72,56
7.	Francujo	7516	5344	71,10
8.	Usono	3660	2570	70,22
9.	Hispanujo	2585	1805	69,83
10.	Danlando	3002	1973	65,72
11.	Japanujo	2860	1780	62,24
12.	Germanujo	7490	4295	57,34
13.	Norvegujo	1993	1105	55,44
14.	Italujo	4247	2305	54,27
15.	Brazilo	5100	2473	48,49

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Aŭstrujo	1580	1390	87,97
2.	Kanado	665	575	86,47
3.	Israelo	250	200	80,—
4.	Portugalujo	535	415	77,57
5.	Islando	250	125	50,—
6.	Novzelando	965	345	35,75
7.	Madagaskaro	250	85	34,—
8.	Aŭstralio	1146	375	32,72
9.	Argentino	960	310	32,29
10.	Sudafriko	375	120	32,—
11.	Urugvajo	250	75	30,—

NI MEM KULPAS

La populara soveta verkisto N. Gribačov, kiel konate, tre multe vojaĝas ĉirkaŭ la terglobo. Priskribante en unu el siaj artikoloj, "La Nova Distanco" la renkontojn kun diversnaciaj verkistoj kaj la lingvobarojn, kiuj malhelpis al la senperaj kontaktoj, li rimarkis:

"La homaro ankoraŭ ne posedas internacian lingvon. Esperanto ne pravigis la esperojn de la homaro."

Mi sendis al Gribačov leteron, en kiu mi penis pruvi al li ke li eraras en siaj konkludoj kaj ke Esperanto perfekte plenumas sian rolon, kaj ke oni povas nur bedaŭri, ke li ne konas Esperanton kaj la esperantistan movadon kaj tial li faras tian nepravigitan deklaron.

Kaj jen kion Gribačov respondis.

"Al mi tre plaĉas la entuziasmo, kun kiu vi defendas Esperanton. Mia opinio homoj celdirektitaj, enamiĝintaj en la ideon, estas ĉiam estimindaj. Mi devas konfesi, ke mi tute ne intencis esprimi ian malŝaton al tiu universala lingvo aŭ deklari, ke ĝi estas senutila.

"Ne ĉiu humana aspiro donas siajn fruktojn. Sed samtempe oni ne povas ignori la faktojn. Kaj la faktoj estas multe malpli esperigaj, ol oni atendis de Esperanto ĉe ĝia apero.

"Mi min trovas en la societo de verkistoj kaj ĵurnalistoj. Ĉiu el ili scias aŭ nur la rusan aŭ ankoraŭ unu lingvon, sed neniu scias Esperanton. Mi vizitis Amerikon, Aŭstralion, Svislandon, Svedion, Germanion kaj aliajn landojn kaj neniam mi renkontis eĉ unu homon, parolantan Esperanton.

"Tio estas la fakto, kaj la ĵurnalista devas konsideri ĝin. Kion fari? Tia estas nia profesio. Povas esti, ke kiam la landoj fariĝos pli proksimaj unu al la alia Esperanto ankaŭ ludos sian rolon. Mi tion ne scias. Sed nun ĉiuj kulturaj ĵurnalistaj, diplomataj kontaktoj estas realigataj en aliaj lingvoj.

Tiu letero estas pripensiga.

Certe, se Gribačov sciis Esperanton, li estus trovinta esperantistojn en la menciitaj de li landoj. Sed temas ne pri tio. Temas pri la granda, mi dirus, fundamenta difekto en nia propaganda laboro, pri la hontemo sin montri esperantisto, aktive labori ĝuste en siaj profesiaj rondoj, propagandi Esperanton ne per teoriaj raportoj, sed per ĝia apliko ne nur en internaciaj renkontoj, sed ankaŭ en la ĉiutaga vivo, aŭdigi Esperanton en la profesiaj kunvenoj, rakonti pri la avantaĝoj, kiujn havas la esperantistoj en sia laboro dum personaj kontaktoj. Kiel povis okazi, ke soveta verkisto kaj ĵurnalista, moskvano, estas sincere konvinkita, ke neniu el liaj kolegoj konas Esperanton, dum la esperantistaro konas la moskvan verkiston kaj malnovan esperantiston Sergeev, la poeton kaj ĵurnaliston Gusev, Danovskij, Sovostjanov kaj multajn aliajn, kiuj eĉ estas membroj de la Internacia Ĵurnalista Asocio?

Kial tia hontemo rilate Esperanton? Ĉu ĝin ne klarigas la timo kompromiti sin ĉe la kondiĉoj, kiam Esperanto estas konsiderata kiel nereala fantazio, kaj la esperantistoj kiel idealistaj stranguloj?

Kaj ĉu ni mem ne estas kulpaj pri la ekzistado de simila opinio? Certe, se la rilato al Esperanto fariĝus pli favora, inter ni troviĝus multe da elokventaj propagandistoj, kiuj fiere demonstracius sian esperantistecon, sed estas ni, de kiuj dependas, ke pri Esperanto ne ekzistu falsa opinio, ke ĝi ĝuu la aŭtoritaton, kiun ĝi indas.

Tiam estintaj esperantistoj, kiel ekz. la verkisto L. Sejnin, ne estus skribintaj pri la entuziasma studado de Esperanto fare de komsomolanoj en la unuaj jaroj de la revolucio kiel pri unu el la multaj ĉarmaj, sed ridindaj idealismaj strangaĵoj.

Neniu povas nei la gravecon de la esperantistaj tendencoj, ripozejoj, restadejoj.

Sed multe pli grava ŝajnas al mi la praktika propagando de Esperanto en neesperantistaj rondoj.

Kun granda intereso mi legis en "Nuntempa Bulgario" la artikolon de Stamenova pri la Internacia Domo de Ĵurnalistoj en Varna, konstruita per la penoj de la ĵurnalistoj de multaj landoj.


"Kiel bone", pensis mi, "ke tiu internacia Domo estas konstruita en Bulgarujo, tiu citadelo de la esperantismo. Tie la tutmondaj ĵurnalistoj havos eblecon likvidi multajn siajn antaŭjuĝojn rilate Esperanton."

Sed, bedaŭrinde, nek en tiu artikolo, nek ĝenerale en la revuo mi trovis eĉ unu vorton kiel en tiu Domo estas solvata la lingva problemo, kia estas la rolo de la esperantistoj-ĵurnalistoj, almenaŭ de la bulgaraj ĵurnalistoj. Mi ne dubas, ke tia laboro estas farata, sed kial ne informi pri ĝi? Se ĉiu esperantisto, precipe esperantistaj verkistoj, ĵurnalistoj, agas kun la sama kuraĝo, aŭtoritato kaj kompetento, kiel Ivo Lapenna, Esperanto jam estus delonge ĝuinta la merititan aŭtoritaton.

Ida Lisičnik

(Represita el "Nuntempa Bulgario")

Krucvortenigmo



(R) = vorto sen finaĵo.

HORIZONTALE: 1) suverena, libera; 9) laŭvice komenca; 10) idonaska estaĵo (R); 11) alternativa konjunkcio; 12) barako aŭ butiketo (R); 14) abstraktaĵo konsiderata realaĵo (R); 15) akcenta, plifirmiga adverbo; 16) supraĵo; 19) somerdomo; 20) altvalora metalo (R); 21) mallongigo por: kaj aliaj; 23) serio da nomoj aŭ aferoj skribitaj laŭvice; 24) trikita vesto; 26) elementa simbolo de griza valorega metalo; 27) idonaska estaĵo; 28) papagospeco (R); 29) personpronomo; 30) konkluda, sekva konjunkcio; 32) plato el ligno aŭ metalo por porti telerojn, glasojn, pladojn k.sim. (R); tiu, kiu konsentos ricevi ion.

VERTIKALE: 1) arbitra, dependanta de individua prijuĝo; 2) malinteresa, malplezuriga, teda; 3) senvestita (R); 4) kvanta prepozicio; 5) ege respektoplena al religiaĵoj (R); 6) loka prepozicio; 7) ritma movado de la membroj; 8) ordonpovo, estro, influa persono; 13) rado kun kanalarando; 14) ŝi, latinlingve; 16) delikata brila fadeno, sekreciita de iu speco de raŭpo (R); 17) kunkolekti fojnon, pajlon k. sim. per dentoprovizita ilo; 18) perkamera bildfarado; 22) farmacia vegetaĵo (R); 25) nedifinita korelativo; 26) plene preparita (R); 28) arbo de marĉaj regionoj (R); 30) prepozicio; 31) kolektiva, ara (R); 32) disdivida prepozicio.

Ivica ŠPONAR, Zagrebo

Esperanta Morsa Kodo

Nuntempe, ĉiun telegrafan laboron oni faras per la angla lingvo. Kiam, kiel ni esperas, Esperanto iĝos la internacie uzata lingvo, ĝi prenos tiun telegrafan rolon for de la angla.

Tial, estas necese havi Morsan Kodon por Esperanta uzado. Eble, (a) ĝi ekzistas, (b) kelkaj formoj estas elpensitaj kaj neniuj el ili estas oficiala aŭ (c) ĝi ne ekzistas. Iuokaze, ĝi ne estas popularigita. Dum estas malmulte da esperantista telegrafa aktiveco, sufiĉas uzi la literon "H" anstataŭ cirkumfleksoj. Sed baldaŭ ni devas havi vere Esperantan Morsan Kodon.

Mi volus, per via revuo, demandi ĉu la situacio estas (a), (b) aŭ (c), kiel supre. Se estas (a) aŭ (b), la posedantoj bonvolu sendi siajn formojn de la kodo al mi frue. Se estas (b), mi elektos unu formon por prezento al la Estraro. Se estas (c), mi elpensos kodon, eble kun rusa bazo.

C. J. McMullen, Subleŭtenanto

H. M. S. Wolton,
c/o G. P. O. Londono
Britujo



Problemo de la esperanta eldonagado

En la esperanta gazetaro oni tute ne okupiĝas pri la problemoj de esperanta eldonagado. Ni nenion scias pri la eldonkvanto de la eldonataj libroj kaj gazetoj, pri ilia disvendebleco. Ankaŭ por ni estas tre grava problemoj de la presprezoj. Esperanta movado estas — tutmonda movado kaj por ni estas tre grava sciigo en kiu lando estas plej malmultekosta presado. Tio ebligas al kelkaj financi iujn eldonojn. Nia gazetaro limigas sin nur al recenzoj, kelkfoje eĉ kun pli ol jara malfruigo, ekzemple tre bone redaktata nia revuo "La Praktiko" de la oktobro nunjara recenzis la verkon de Marjorie Boulton "Virino ĉe la landlimo", kiu aperis antaŭ 16—17 monatoj. Tio ankaŭ ne helpas al popularigo de nia literaturo. La recenzoj plej parte estas sukerdolĉaj — ĉar kiel prave diris unu el niaj eminentaj verkistoj en interparolo kun mi: "la kelkaj verkas, kelkaj aliaj recenzas kaj por ne malutili al ili, oni serĉas nur preserarojn kaj malmultajn tuŝas la temon kaj stilon de la verko recenzata. En la recenzataj verkoj oni devas tuŝi la temon, stilon, gramatikajn formojn kaj nur laste la preserarojn. Al verkistoj kaj tradukistoj oni devas

helpi. Per amikeca helpo montrante al ili malfortajn flankojn de ilia verko".

Sed min interesas ĉi tie ne la recenzproblemo sed analizo de la eldonagado. Estas bedaŭrinde, ke niaj vere bonaj literaturaj revuoj kiel "La nica literatura revuo" kaj "Norda Prismo" tute ne okupiĝas pri la analizo de eldonado kaj disvastigado de la esperantaj libroj kaj gazetoj. Tio povus helpi al ĝisnunaj aŭ estontaj eldonistoj. Kelkfoje dum la interparolo kun diversaj aktivuloj de nia movado oni vidas nekonatecon de la problemoj. Speciale pli junaj esperantistoj kritikante ĝisnunan agadon sur tiu kampo eldiras kelkfoje opinion pruvantan nekonatecon de la problemoj. Fakte se ni komparas eldonkvanton de niaj libroj, kiuj plejparte estas eldonataj en po 1000—1500 ekzempleroj, povas altrudi sin impresoj, ke la esperantistaro ne legas. Tio tamen ne estas ĝusta impresoj. Mi malgraŭ ĉio kuraĝas aserti ke esperantistoj legas kaj aĉetas la esperantan literaturon.

Se ni komparas esperantan eldonkvanton kun nacilingva ni neniam forgesu, ke organizitoj, do fakte eventualaj legantoj kaj aĉetantoj de esperantaj libroj ne superas 50—70 mil personojn. De tiu nombro sufiĉe granda elcento loĝas en landoj, de kie oni ne povas mendi eksterlandajn librojn. Se ni komparas landon sufiĉe grandan kiel Pollando, kie civitanoj ŝatas legi kaj aĉeti librojn, ni povas konstati, ke je pli-malpli 4 milionoj da eventualaj legantoj mi kalkulas nur personojn, kiuj tamen povas legi kaj legas. En nia lando maljuna generacio de vilaĝanoj tute ne legas librojn, kvankam post la milito tiu situacio jam ŝanĝiĝis kaj la libro trafas al la pli maljuna vilaĝana loĝantaro, sed ili ne aĉetas la librojn sed pruntas de la legejoj. Tuta loĝantaro de Pollando nun nombras ĉirkaŭ 30 milionoj da personoj. La eldonkvanto de eldonataj libroj estas meze 10 mil ekzempleroj. Memkompreneble estas ankaŭ eldonoj po 50 kaj 100 mil ekzempleroj. Sed simpla eldonkvanto estas 10 mil. La malpli konataj verkoj aperas ankaŭ po 5000 ekz kaj malpli. Libroj kiuj speciale trafas al gusto de la legantoj estas tuj post apero elĉerpitaj kaj simplaj verkoj same kiel esperantaj kuŝas en la librejoj po kelkaj jaroj. Ĉu poloj ŝatas nur facilan literaturon, sensacian? Certe jes! Kiel cetere ĉie post mensa elstreciĝo oni volas iom ripozi, sed ankaŭ bonaj libroj traktantaj diversajn problemojn de homa vivo tre rapide disvendiĝas. Vere poloj havas "literaturan guston" se oni tion povas nomi, do komparante eldonkvantojn de esperantaj libroj kaj nombron da organizitaj esperantistoj kun polaj eldonaĵoj kaj nombro da poloj mi fariĝis optimisto kaj diras ke, esperantistoj ŝatas sian literaturon, sed niaj verkistoj penu doni al ili pli bonkvalitan literaturon kaj es-

perantaj organizaĵoj penu liveri la esperantaĵojn al ĉiu eĉ individua esperantisto; tiam ni povas esperi ke niaj libroj eldonataj eĉ en kvanto de 3 mil da ekzemp. baldaŭ elcerpiĝos.

Memkompreneble ĉi tie ludas ankaŭ gravan rolon nombro da eldonataj titoloj. Laste en esperanta literatura vivo ni estas atestantoj de sufiĉe granda vivo de la eldonagado. Multaj landoj, kie dum multaj jaroj ne aperis esperantaj libroj komencis tian eldonadon. Ekzemple en Pollando de la 1956 jaro aperis krom lernolibroj, literaturaj verkoj aŭ aliaj publikaĵoj 10 titoloj. El tiu nombro la plejparto de la titoloj estas multpaĝaj. Same ni observas la renovigon de la eldonagado en Bulgario kaj en Jugoslavio. Ni devas substreki tiuspecan reaktivigon en Ĉinio kaj laste Demokratio Vietnamio ankaŭ enviciĝis al la kadroj de niaj eldonistoj. Kiel ni povas konstati, kreskas la kadro de la eldonistoj kaj samtempe la nombro de la eldonataj titoloj. Komparu nur kiom da titoloj eldonas nia vere energia "Stafeto". Do sume por ĉiu esperantisto oni eldonas jare pli ol 1 ekzempleron de la libro. Ĉar laŭ pli-malpli preciza kalkulo aperas jare ĉirkaŭ 40 titoloj de literatura speco sen lernolibroj. Memkompreneble ne estas tio multe, sed se ni komparas malfacilaĵojn de disvendado, kiom da esperantistoj vivas en lokoj kie ne estas vendataj esperantaj libroj, aŭ librostando estas malbone priservata. Ĉi tie gravan rolon ludas manko de propraj sidejoj kaj kutimo speciale en okcidento kunveni en kafejoj. Por tamen pliaktivigi nian eldonagadon ni devas kun esperanta libro atingi eĉ ĉiun individuan esperantiston. Tie, kie loka movado estas sufiĉe forta, fondi bone priservatajn librostandojn aŭ peni interkompreni kun neesperantistaj librovendistoj aŭ gazetvendistoj (1 en urbo), ke ili vendu esperantaĵojn.

Speciale estas grava solvo de la problemoj kapti aĉetantojn el landoj de kie oni ne povas transpagi la monon. Tion oni povas fari parte per la interŝanĝo de libroj aŭ se veturas iuj esperantistoj al tiuj landoj, ili antaŭe interkompreni kun la konvena Asocio aŭ delegitoj kaj ĉiam kunpreninte kun si kelkajn librojn oni povas ilin vendi. Tio tre helpas al pligrandigo de eldonkvanto kaj plioftigo de la titoloj.

Tria tre grava faktoro, aŭ eĉ plej grava, estas amase instrui Esperanton. Niaj landaj Asocioj fariĝinte pli amasaj liveroj al ni novajn legantojn kaj havigantojn de esperanta literaturo. Kio kaŭzos plivigliĝon de la esperanta eldonagado, tio siavice helpas al disvastigo de esperanta movado.


De la supre nomita ni forigu pesimismojn, klare kaj sobre pritaksante niajn atingojn kaj eblecojn sur tiu plej grava kampo de nia agado.

Stefan Rosłonec

De Londona




*Supre (maldekstre): Printempo en londona parko;
(dekstre) sunpavilono en Harrogate.*



tra Harrogate

*Malsupre (maldekstre): Fontan-Abatejo; (dekstre)
strato en Jorko. Ambaŭ estas ekskurslokoj de la U.K.*






Valĝardenoj, Harrogate



Skotlando malfermas siajn pordojn !

gis
s
k
a
t
l
a
n
d
a

(Dekstre :
Edinburgo)





LA JUNA VIVO

Cion por la redakcio de "L. J. V." sendu al :
Heinrich Reiter, Altmannsdorferstr. 90;
Wien XII, Aŭstrujo.

JUNULARA BALO EN BULGARUJO

La 4-an de Februaro k. j. en la urbo Plovdiv okazis la Dua tutlanda junulara balo. La vizito kaj partopreno superis la plej optimismajn antaŭvidojn de la organizantoj. Dum la tuta tago la vagonaroj elverŝadis sur la konvene ornamitan stacidomon pli ol 400 junajn gastojn de la renkontiĝo el 17 urboj kaj vilaĝoj. Vespere entute 700 personoj plenigis la salonojn de la plej luksa restoracio de la urbo — "Trimoncium". Vera malgranda kongreso. Inter la brua junulara publiko estis tutaj lernantaj klasoj kun siaj instruistoj, malnovaj konatoj kaj novaj esperantistoj. Estis videblaj ankaŭ la blankhararaj kapoj de kelkaj E-pioniroj el Plovdiv, kiuj venis propraokule ĝui la viglecon de la esperantista junularo — la printempo de nia movado.

La ĉeestantoj estis salutitaj de la sekretario de BEA — V. Oljanov, de la Prezidanto de la Junulara Sekcio — ing. S. Simeonov, de reprezentanto de la urba komitato de la Komsomolo k. a.

En la programo partoprenis junaj esperantistoj kaj profesiaj geaktoroj. En ĝoja atmosfero, kun dancoj kantoj kaj humoraĵoj la gejunuloj amuziĝis ĝis frua mateno. Ne mankis eĉ moda revuo.

La venontan tagon okazis la oratora konkurso. La unuan premion konsistantan el la tri volumoj de la "Faraono", gajnis k-do A. Ĉalakov el Burgas. Bone sin prezentis ankaŭ la aliaj gepartoprenantoj: D. Ĉolakova kaj S. Simeonov el Sofia kaj P. Arnaudov el Pazarĝik. Dum la organizita junulara konferenco, la reprezentantoj de la lokaj junularaj grupoj interŝanĝis sperton pri la estonta agado kaj faris multajn utilajn proponojn.

Speciale por la balo sovjeta fraŭlino sendis valoran donaceton kun la deziro, ke ĝin ricevu la plej ĝoja partoprenanto en la balo. Sub la aplaŭdoj de la publiko la bonodoranta bukodon de artefaritaj floroj en eta vazo ricevis Dimitar Vasilev el Plovdiv.

La programo de la dutaga renkontiĝo finiĝis per ekskurso tra la antikva parto de la urbo por la multnombraj gastoj alvenintaj el la tuta lando. La tutlanda printempa balo estiĝis jam bela tradicio en la vivo de la bulgara esperantista junularo.

S. S.

INTERNACIA ESPERANTISTA LIBERTEMPEJO SUR ADRIATIKO

Junulara esperantista grupo ĉe la Observatorio de Zagreb, kiu famiĝis pro sia verko "Tragedio en Universo" organizos ĉi-jare internacian esperantistan libertempadon en la belega golfo de Primošten.

Primošten estas urbeto sur la Adriatika bordo, situanta inter la havenurboj Split kaj Ŝibenik. Ĝia ĉirkaŭaĵo kun pluraj golfoj kaj pitoreska "norvegieca" fjordo prezentas agrablan someran restadejon.

La tendaro troviĝos en pinarbaro sur la duoninsuleto apudanta la romantikan, lazuran golfon. Kiuj ne volos loĝi en tendoj, povos loĝi en la urbeto (malproksima triminutan promenon de la tendaro). Loĝado en domoj kostos 250.— dinarojn po persono nokte, sed tendojn oni povos lupreni je multe malpli alta prezo. En la tendaro ĉiu grupo povos organizi propran kuirejon aŭ aliĝi al la komuna. En restoracioj la tuttaga manĝaĵo (tri manĝoj) kostas 480.— dinarojn.

La libertempejo ne celas esti luksa, sed preze kiel eble plej modera por ebligi al kiel eble plej multaj esperantistoj, precipe junuloj, ĝui la lazuran maron, la romantikan naturon kaj — veran Esperantujo.

Krom la belega, virga naturo, for de turista tumulto, banado en la lazura maro, la partoprenontojn atendas ankaŭ multaj distroj: fiŝkaptado superkaj submara, laŭvola vojaĝado kun lokaj fiŝkaptistoj al la vastmara fiŝkaptado, velŝipa veturo al romantikaj najbaraj insuloj (unu el ili havas la nomon "Insuleto de amo") kaj vigla amuza tendara vivo.

La junaj astronomoj esperas bonveni en sia libertempejo, kiu funkcios de nun ĉiujare, plurajn enlandajn kaj eksterlandajn esperantistojn, precipe la gejunulojn.

ovi

SKIKONKURSO DE TEJO

De la 26-a de Decembro ĝis la 9-a de Januaro okazis la 6-a skiferio de TEJO kun skikonkurso en Filzmoos, en Aŭstrujo. La aranĝon partoprenis 35 gejunuloj el 10 landoj: Anglujo, Aŭstrujo, Belgujo, Etiopujo, Francujo, Germanujo, Italujo, Nederlando, Svedujo kaj Svisujo.

La unuan premion ĉe la internacia skikonkurso gajnis Frank Giessner por knaboj, kaj Marlies Unger por knabinoj, ambaŭ el la Federacia Respubliko Germanujo.

Trifoje okazis lecionoj por komentantoj (lingvaj) kaj dufoje okazis laborkunsidoj, dum kiuj oni decidis — kiel rekomendon al TEJO — aranĝi la skiferiojn estonte kiel "Vintrorenkonto de la Eŭropa Junularo" kun diversaj konkursoj sub la gvido de TEJO.

La venonta skiferio de TEJO okazos fine de la jaro denove en Filzmoos.
H. R.

PIONIRA MOVADO EN HUNGARUJO JUBILEAS

La hungara pionira movado (simila al la skolta) ĉi-jare festas sian dek kvinjaran agadon. La pionira revuo "Tábortüz" (Budapest V, Beloiannis-z-u. 16) volonte aperigas la adresojn de esperante korespondantaj geknaboj. Ankaŭ ĝi aperigas interesajn rakontetojn pri okazintaĵoj el geknaba vivo. Tial, per salutleteroj al la revuo kaj al la Hungara Pionira Asocio (Budapest V, Nádor u. 28) subskribitaj de geknaboj — eble kun desegnaĵoj — oni povas esprimi solidarecon kaj samtempe pruvi disvastigitecon de la Internacia Lingvo inter la infanoj diverslandaj.

FONDIĜIS INFORMA FAKO DE PEJ

Organiza kresko de la Pola Esperanto-Junularo kaj samtempe kreskanta interesiĝo pri Esperanto en la junularaj medioj de Polujo kreis la bezonon fondi apartan Informan Fakon de PEJ.

Post la preparlaboroj fondiĝis nun la Informa Centro de la Pola Esperanto-Junularo, kiel ĝermo de laŭtempe organizota multelementa IF. En kadro de la Informa Centro funkcios landa koresponda servo kaj la fotoservo.

La Informa Centro de PEJ devas plenumi diversajn taskojn, el kiuj la plej gravaj estas: organizo de informado pri Esperanto en polaj junularaj asocioj, koordinado de laboro de la Junularaj Rondo de PEJ kaj la esplor-dokumenta laboro ĉe la junulara Esperanto-movado.

La Informa Centro de PEJ daŭrigos la eldonadon de la gazeto "Tamen", aperigos sian bultenon kaj adresaron de la Koresponda Servo.

Por ke la Informa Centro funkciiu kontentige, kaj plenumu bone siajn taskojn, necesas vasta reto de konstantaj kunlaborantoj.

Ŝaka Rubriko

(Gvidas : D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakio)

Mondĉampiono Tal ludis kontraŭ 20 ĉeĥoslovakaj junuloj.

Simultanludo de unu majstro kontraŭ aro da ŝakistoj estas konata maniero de propagando de ŝakludo. Krome ĝi ebligas eĉ al pli malforta ŝakisto ludi kontraŭ konata majstro. Tiaj simultanludoj okazas kutime kontraŭ 20-30-40 kontraŭuloj kaj la majstro iras de unu ŝaktabulo al la alia kaj faras siajn movojn. Estas majstroj, kiuj ludis jam kelkdekojn da tiaj simultanludoj. Sed la simultanludo de Tal kontraŭ 20 ĉeĥoslovakaj junaj ŝakistoj estis unua de sia tipo. Ĝi ja okazis per radio. Tal sidis en Riga kaj liaj kontraŭuloj en diversaj lokoj en Ĉeĥoslovakio. Ek de 2.12.1960 la radiostacio Praha dufoje ĉiutage anoncis la movojn de mondĉampiono Tal kaj poste la movojn de liaj kontraŭuloj, kiuj ĉiam devis telefone anonci siajn movojn al radiostacio; la organiza flanko de tiu ĉi simultanludo funkciis perfekte. La ludo vekis vere neatenditan intereson. La redakcioj de ĵurnaloj kaj la radiostacio estis ĉiutage supersutitaj per telefonaj demandoj kaj preskaŭ ĉiuj ĵurnaloj publikadis ĉiutage la movojn en ĉiuj partioj. Sporta revuo alportadis diagramojn de la partioj. En multaj urboj kaj en multaj lernejoj (ĉar preskaŭ ĉiuj partoprenantoj estas lernejoj) estis lokitaj grandaj ŝaktabuloj, kiuj ĉiutage registris la faritajn movojn. Vere tuta lando parolis pri la ŝakpartioj kaj iliaj eblaj rezultoj. La perradia parto de la simultanludo daŭris ĝis 21.12., kiam tiu ĉi parto finiĝis per 30aj movoj de junuloj. La 31-aj movoj de Tal estis enfermitaj en kovertoj kaj tie atendis ĝis dua parto de simultanludo, okazinta 29.1.61 en Praha. La plej granda salono en Praha apenaŭ sufiĉis por miloj da interesuloj, kiuj volis vidi kaj la mondĉampionon, kaj la junulojn, kiuj sukcesis tiel bone ludi kontraŭ Tal. En perradia parto finiĝis unu partio per remio. La dua parto, kiu estis ludita kun tempo-kontrolo, alportis belan rezulton por ĉeĥoslovakaj junuloj. El 19 partioj, finludataj en Praha, 8 finiĝis per remio


kaj 11 per gajno de la mondĉampiono. La fina rezulto 15½ : 4½ favore al la mondĉampiono estas certe tre bona por liaj kontraŭuloj. Ĝi montras, ke la junularo okupiĝas serioze pri la ŝakludo kaj oni do povas rigardi en la estontecon kun espero.

Historio de esp.-ŝaka movado.

En malnova esp. revuo ni vidis inviton al kunveno de esp. ŝakistoj dum Dresdena kongreso 1908. La invito estis subskribita per "Societo de Esperantistaj Ŝakludantoj". Bedaŭrinde, ni scias nenion alian pri tiu ĉi societo kaj tial ni petas ĉiun samideanon, kiu scias ion pri ĝi, ke li skribu tion al gvidanto de tiu ĉi rubriko. Nia Esperanta Ŝak-Ligo Internacia penas registri ĉion, kio koncernas esp. ŝakon kaj bezonas ĉies helpon.

Problemo n-ro 11 (konkurs problem 2)

V. Hebelt (Ia pr. Zvajgzne 1957).



Mato en 2 movoj (pro ĝusta solvo 2 poentoj)

Kontrolo : Bl. : R h4, D g8, Te7, Tg5, K a6, K h2, Ĉ e6, Ĉ f4, p. : g2 (9)

Ni. : R e4, D c4, Kf5, Ĉ b2, Ĉ h1 p. c2, c5, d2, e3, h7 (10)

Solvojn sendu al gvidanto de la rubriko ĝis 31.8.61.

Radio - kaj T.V. - Babiloj

„La geesperantistoj havas la dissendojn, kiujn ili meritas“

(29)

Post malsukcesa aŭskultado ofte sukcesa

Eble vi plurfoje klopodis aŭskulti anoncitan Esperanto-programon de eksterlanda radio-stacio sen sukceso kaj tial, senkuraĝiĝinte, ne reklopodis. Tio estas malsaga sintenado, ĉar la stato de stacio aŭ de la atmosfero povas foje esti tre malfavora por bona ricevo, aliffoje subite aŭ denove tre favora. Do nepre reklopodu !

Ofte mi vane klopodis aŭskulti la kurson de mia franca amiko s-ro Pierre Delaire ĵaŭde je la 9.30-a (M.E.T.) per Parizo, 235 kaj 280 m : mi aŭdis plurajn eksterlandajn staciojn, sed ne Parizon. Longe mi rezignis serĉi tiujn staciojn, sed 26-1-1961 mi forte kaj klare rekoneble aŭdis la voĉon de s-ro Delaire tra la etero, kiam li instruis sian lernantinon videblan "Simone" kaj samtempe multajn nevideblajn geaŭskultantojn. Poste mi plurfoje aŭdis Parizon kun la sama bona sukceso. Tiel okazis al mi ankaŭ rilate la stacion Zagreb. Pasintsomere mi ofte vane klopodis aŭdi ĝin kaj ĉi-vintre ĝi denove estas forte kaj klare aŭdebla, kelkfoje tre ĝenate de aliaj stacioj, sed aliffoje apenaŭ aŭ tute ne.

Do ne tro baldaŭ perdu la kuraĝon kaj reprovu. Sukceson !

"Cirklo de la Mondo"

La stacio Hilversumo A.V.R.O. ŝajnas ekinteresiĝi pri Esperanto. Marde de 16.30 ĝis 17.20 ĝi dissendas programon por geknaboj sub la titolo "Tovercirkel" (= Magia Cirklo). Unu el la gegvidantoj, s-ro Herman Broekhuizen, konstatinte dum vizito de esperantistaj geknaboj el Finnlando al la stacio, kiel facile ili Esperante babilis kun Hilversumaj esperantistaj geknaboj, lernas nun Esperanton kaj jam aplikas ĝin en la supre nomita porjunulara programo. 31-1-1961 li jam paroligis kaj kantigis Esperanton : f-ineto Feliĉa Koopmans deziris : "Bonan tagon al la infanoj de la tuta mondo !" kaj infana ĥoro kantis Esperante. S-ro B. mem diris nederlandlingve ion pri la estiĝo kaj apliko de Esperanto kaj pri la intenco formi "ĉirkolon de la mondo" inter la infanoj, kiuj interŝanĝos donacetojn kaj sonbendojn kun samaĝul(in)oj alilandaj. La dissendo de 28-2-'61 estos dediĉita al polaj infanoj kaj tiu de 28-3-'61 al japanaj. Nepre aŭskult(ig)u la Esperantan parton de tiu "Magia Cirklo" la lastan mardon de ĉiu monato kaj skribu al la gvidanto de tiu programero : s-ro H. Broekhuizen, A.V.R.O., postbus 4, Hilversum, Nederlando.

La Pola Radio diskonigis frisan rakonton en Esperantotraduko

En sia belega "literatura rubriko" Varsovio tre belsone voĉ-legigis 17-2-'61 la Esperanto-tradukon de la frisa rakonto de Freark Dam "Memorigilo". Multaj gazetoj en Nederlando skribis pri tio. Bona atentigo pri Esperanto kaj la literaturo de malgranda popolo, kiu bezonas Esperanton eĉ pli ol grandaj.

Tjerkwerd, 24-2-1961.

S. S. de JONG, Dzn.



Kelkaj gesamideanoj de Mantova Esperanto-Grupo, post inaŭguro de Strato ESPERANTO en Mantova, Italujo, la 26an de februaro, 1961. La Prezidanto de la grupo, Prof. M. Bardini, staras maldekstre.

INTERNACIA KARAVANO AL TOKIO

Ĉar el eŭropaj landoj supozeble la nombro da partoprenantoj en la Tokio-Kongreso ne estos tiel granda, ke estos eble, el apartaj landoj sendi karavanon, kiel kutime okazas se temas pri Kongreso en Eŭropo, la Estraro de U.E.A. principe decidis en sia printempa kunsido, iniciati internacian grupvojaĝon per luita aviadilo. Ĝi forveturos de iu centra eŭropa urbo. Tio ebligas la plej altan rabaton kaj la plej grandajn avantaĝojn.

Ne necese diri, ke la iniciato povos sukcesi nur, se la nombro da partoprenantoj estos kontentiga. Se efektiviĝos la plano, la rabato povos esti ĝis duono de la normala veturprezo.

De nun, ĉiu kiu principe interesiĝas pri tiu vojaĝo, bonvolu anonci sin ĉe la Centra Oficejo de U.E.A., Eendrachtsweg 7, Rotterdam-2 Nederlando. Tiu provizora anonco kompreneble ankoraŭ neniel estas deviga.

M. H. Vermaas
Dir. C. O.

SEMINARIO „ORIENTO- OKCIDENTO”

Ĉi tiu aranĝo, jam anoncita, okazos en University College, LONDON, de la 2-a ĝis la 4-a de Aŭgusto 1961, en kunligo kun la Antaŭkongreso. Jen pluraj detaloj pri la programo :

Prelegoj :

”Kultura Renaskiĝo de Ĉinujo”, de N. Barnes, B.A., lingvisto ĵus reveninta el Ĉinujo;

”Impresoj pri Libano, Etiopujo kaj aliaj landoj de la Proksima Oriento”,

”Interago de Okcidentaj kaj Orientaj Kulturoj en la Proksima Oriento”, ambaŭ de D-ro P. Neergaard, Akademiano, ĝis Julio 1961 profesoro de Agrikulturo en la Usona Universitato de Beirut;

”Japanujo Travivita de Eŭropano”,

”La Prahistorio de Afriko”,

”La Kultura Medio de Hindujo”, ĉiuj tri de Lic. Tibor Sekelj, konata esploristo kaj vojaĝisto;

”La Influo de la Okcidento sur la Pensmaniero de Japanoj”, de Prof. D-ro Hideo Yagi, Prezidanto de la Okayama Universitato.

Oni ankoraŭ aranĝas pluajn prelegojn kaj certe estos minimume du aliaj interesaj parolantoj. Okazos ankaŭ vizitoj al diversaj muzeoj kun tre gravaj ekzemploj de Orientaj Arto, Kulturo kaj Historio. Plue, kontraŭ pago, oni aranĝos manĝojn en du aŭ tri el la tre bonaj Orientaj Restoracioj de Londono. Inter la partoprenantoj estos granda nombro de samideanoj el Orientaj landoj, tiel ke liberaj diskutoj permesos plenan interŝanĝon de opinioj.

Norman R. Smith

ALVOKO PRI LA TRIA LITERATURA KONKURSO POR LA PREMIO „COMELLA-BASSOLS”

Ĝeneralaj reguloj :

1. La konkursaĵoj havu la amplekson de po 2000-3000 vortoj.
2. La konkursaĵoj nepre estu maŝinskribitaj kaj oni sendu 4 ekzemplerojn.
3. Oni skribu sur ĉiu konkursaĵo pseŭdonimon por kaŝi la identecon de la aŭtoro, kaj — en aparta koverto — sian nomon kaj adreson kune kun la pseŭdonimo.
4. La Juĝanta Komisiono, laŭ deziro de S-ro Jacint Comella, (kreinto de la Premio) konsistas el eksterlandaj samideanoj, membroj de U.E.A., kune kun katalunaj juĝantoj.
5. La konkursa kotizo, por unu aŭ pluraj rakontoj, estas 10 pesetoj por Hispanujo, kaj por eksterlando 4 steloj aŭ 3 respondkuponoj. Por landoj kie ne estas eble sendi la kotizon, la partopreno estas senpaga.
6. Kiam publikiĝos la Verdikto, samtempe estos sciigata la koncerna Juĝantaro.
7. La limdato por la ricevo de konkursaĵoj estas la 31a de Aŭgusto, 1961.

Oni sendu ĉion laŭ la jena rekomendo :

POR LA KONKURSO ”COMELLA-BASSOLS”

S-ro Francesa Vilà — Sekretario

INSTITUTO DE ESPERANTO

Montcada, 12 BARCELONA (3) Hispanujo.



Dum sia lastjara funkciado en la Usona universitato en Bejrut, D-ro Paul Neergaard kreis tie kernon de movado el kiu rezultis la Libana Esperanto-Asocio. Nun funkcias en la universitato du kursoj kun 78 studentoj. La bildo estas farita dum la Zamenhof-festo de la nova asocio en decembro 1960. La motoroj de la Libana asocio estas Prof. Adib Saad, prezidanto, kiu instruas pere de la angla, kaj la delegito de U.E.A., Talal Aboul Zahab, kiu instruas pere de la franca lingvo la multnacian kursaron,

Tra la Mondo

Alĝerio

● "Por povi helpi UNESKON realigi sian plej gravan projekton "Oriento-Okcidento" kaj por fine atingi plenan porpagan kunlaboradon, la kunhelpo de ĉiu homo estas necesa". En tiu ĉi spirito estis kreita la Monda Ambasadado "Por Unesko". Starante je la servo de la homaro, ekster kaj super ĉiuj politikaj partioj kaj filozofiaj aŭ religiaj organizoj, la Ambasado, kies kunlaborantoj nepre esperas helpi la klopodojn de UNESKO, estos la "porparolanto" de ĉiuj personoj, kiuj esprimos sian favoron por la celoj kaj idealoj de la Organizo de la Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo. Por ricevi senpage kompletajn informojn, skribu al: AMBASSADE MONDIALE "POR UNESCO", Rue Dr. Trolard 4, ALGER, Alĝerio.

Britujo

● La estraro de Universala Ligo kore invitas ĉiujn kongresanojn al la UL-kunveno en Harrogate por aŭdi interesan paroladon en Esperanto de s-ro Anthony Brooke, lasta rajao de Seravako (nord-okcidenta parto de la insulo Borneo), membro de UEA kaj Aktiva Membro de Universala Ligo. La loko kaj horo de la kunveno estas indikitaj en la Kongresa Programo.

● La 14a Kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia en 1961 okazos en Hockerhill Training College, Bishop's Stortford, Herts., Britujo, de la 29a de julio ĝis la 5a de aŭgusto (tuj antaŭ la U.K. en Harrogate).

KELI festos ĉijare sian 50-jaran ekzistadon. Informojn de la kongresa sekretario: s-ro F. Douglas Murphy, 7 Constable Road, Ipswich (Suffolk), Britujo.

Bulgarujo

● Dum la pasinta jaro la esperanto-societo "Radio" en urbo Pazarĝik havis 79 anojn. Estis gviditaj 9 kursoj kun 136 partoprenantoj. La societo kvinfoje aranĝis disaŭdigojn per la loka radio kaj pli ol 20-foje ĝin utiligis pri anoncoj. Okazis kunvenoj dediĉitaj al Svedujo, Japanujo, Meksikio. UEA-Kongreso ktp, kun speciale alsenditaj magnetofonaj bendoj. Sur ĉefaj stratoj oni disponas pri 2 vitroketoj. Dum la jaro la societa biblioteko kreskis de 80 ĝis 110 libroj.

Ĉeĥoslovakio

● Ĉeĥoslovakio en Nombroj estas la titolo de la informa faldfolio eldonita de Orbis, Prago. Ĝi donas utilajn ciferojn pri la teritorio, loĝantaro, industrio, terkulturo, k.s., kaj estas verŝajne senpage ricevebla de Orbis.

Danlando

● La konataj Internaciaj FERIAJ Kursoj en Helsinger (Elsinoro) okazos ĉijare, kiel okazis jam dum pli ol 25 jaroj. Ilia alta kvalito kaj reputacio

estas tiel konataj, ke ili apenaŭ bezonas pluan rekomendon. Senpagan prospekton oni povas ricevi de: L. Friis, Ingemannsvej 9, AABYHØJ, Danlando. La kursoj okazos de la 23a ĝis la 30a de julio.

Finnlando


● Aĝemaj junulinoj aranĝis festeton en Turku. La esperanto-grupo de la mezgrada knabinlernejo en Turku invitis ĉiujn lokajn gesamideanojn por partopreni la komunan festeton vesperan je la 10a de marto 1961. Minimume cent esperantistoj troviĝas en la urbo kaj el ili pli ol kvindek ĉeestis kaj ĝuis pro la bela kaj altnivela programo. Sub la gvido de preĝeja orgenisto Pauli Riihivaara la esperanta koruseto "Amikaro" prezentis kelkajn kantojn esperantlingve. S-ino Irja Klemola, lektorino de matematiko en la nomita lernejo, parolis pri la signifo de la internacia lingvo, kiu estas neŭtrala kaj egala esprimilo por ĉiuj homoj. Preĝeja kantoro, s-ro Innilä kantis du solkantojn de Beethoven kaj Schumann, ankaŭ nature en Esperanto. Pri la sukcesa studvizito en kopenhagaj lernejoj rakontis instruisto Jorma Ahomäki, kiu havis feliĉon aranĝi tian vojaĝon pere de Esperanto. Inter aliaj programeroj komunaj kantoj sonis bele kaj fine oni regalis ĉiujn per bonega teservado. Tre kontentaj partoprenantoj elĉerpis novan entuziasmon kaj kunportis hejmen belajn memorojn.

● Ni jam raportis pri tio, ke la finna gazeto "Keski-Pohjalainen", kiu aperas en Pietarsaari, volonte aperigas artikolojn tradukitajn el Esperanto. La du plej freŝaj estas "Religia vivo en Indonezio" kaj "Festkalkula bildo en Katalanujo". La tradukojn faras loka samideanino f-ino Olga Ihander.

Francujo

● Kongreso de Francaj Popoluniversitatoj. Dum tri tagoj delegitoj de francaj popoluniversitatoj lastatempe partoprenis en Lille la nacian kongreson de sia federacio. Dum la laborkunsidoj, kiujn prezidis s-ro André Marie, iama ĉefministro kaj edukministro, intervenis amikoj de Esperanto. Temis pri s-ro Pierre Petit, internacia prezidanto de la Popoluniversitatoj, kaj D-ro Marcel Mollion, prezidanto de la internacia kultura asocio de la fervojistoj. Krome s-ro Jean Guitten prelegis pri la lasta konferenco de Unesco. Ĉe la kongreso s-ro Lucien Giloteaux reprezentis la Francan Unuiĝon Esperantistan.

● Prelegoj de D-ro. Johano Hamvai en Perpignan (Francujo). D-ro Johano Hamvai kaj edzino, el Auckland, Novzelando, estis la gastoj de la Kultura Centro Esperantista de Perpignan dum la tagoj 26a de Februaro ĝis la de Marto. La 27an de Februaro, D-ro Hamvai vizitis la Porinstruistan Seminarion de Perpignan, kie okazas regulaj devigaj kursoj de Esperanto sub la gvido de S-ro René Llech-



Walter, la aktiva prezidanto de Unuiĝo Esperantista Franca. Tie li faris esperantlingvan paroladon pri Novzelando kaj respondis la scivolajn demandojn de la lernantoj. Tuj poste li ĉeestis la Esperanto-klasojn por komencantoj kaj por progresantoj, kaj li povis konstati la bonegan scion pri nia lingvo jam akiritan de tiuj estontaj instruistoj. La saman vesperon, sub la aŭspicio de la Politeknika Asocio (Popoluniversitato de Perpignan), D-ro Hamvai faris prelegon en la Urbodoma Salono "Arago" pri Novzelando, ĝia socia progreso kaj la mao-ria popolo. Lin prezentis al la publiko S-ro. Llech-Walter, kiu mem estas direktoro de la prelegservo de tiu asocio. La multnombra aŭskultantaro sekvis atente la interesan paroladon de D-ro Hamvai en la esperanta lingvo, kiun tradukis S-ro Gendre al la nacia lingvo por la neesperantistoj.

Antaŭ la prelego okazis gazetara konferenco en luksa restoracio, kie la ĵurnalistoj intervjuis D-ron Hamvai. La gravaj regionaj ĵurnaloj "Midi Libre" kaj "L'Indépendant" aperigis longajn kaj favorajn raportojn, menciante la gravan rolon de la Internacia Lingvo por la kulturaj interŝanĝoj.

● La Interrilata Centro Internacia de la Esperantistaj Kampadistoj (I.C.I.E.K.) organizas de la 22a ĝis la 27a de Julio venonta, en VALLON-PONT D'ARC (Ardèche-Francujo), okaze de la oficiala inaŭgurado de Internacia Kampadejo "D-ro ZAMENHOF", Internacian Kampadrenkonton, dum la Esperantista Semajno okazigata de la Grupo "VIVARA STELO" el AUBENAS.

Alveno kaj instalado de la Kampadistoj: Sabate la 22a de Julio 1961a.

La programo, tre alloga, entenas plej agrablajn ekskursojn en regiono Ardèche, interesajn vizitojn al mirinde belaj grotoj kaj al diversaj fabrikoj.

ALIĜOJ:

Plenkreskuloj, antaŭ la 31a de Majo: 5 NF (15 steloj)

Plenkreskuloj post la 31a de Majo: 8 NF (23 steloj)

Gejunuloj (de 16 ĝis 21 jaroj) kaj gestudentoj 3 NF (9 steloj)

Infanoj, malpli ol 16-jaraj: SENPAGE

Tuj petu kompletan programon kaj aliĝilon de la Kasisto de I.C.I.E.K.: S-ro M. CURNIER, Rue St-Jacques, BERGERAC (Dordogne-Francujo).

Bonvolu aldoni laŭkaze ĉu poŝtmarkon, ĉu internacian respondkuponon.

● **Dank' al Esperanto** s-ano Saperas, instruisto en Vire (Calvados) povis trovi siajn hispanajn familianojn. (Kelkaj el ili emigris al Argentino). Por atingi tiun rezulton s-ano Saperas turnis sin unue al s-ro D. Dalmau, prezidanto de la Barcelona Grupo. Poste s-ro Olivé, Delegito de UEA, zorgis pri la familia serĉado en la regiono de Lerida. Post multaj klopodoj, korespondado kaj telefonado, la rezulto estis trafita. S-ro Saperas ĝoje ektrovis familianojn, kiujn milito kaj revolucio apartigis de li!

Germanujo

● **La unua feriosemajno en hejmo de la kultministerio.** Je la komenco de la someraj ferioj 28. de junio ĝis 5. de julio okazos en hejmo de la kultministerio en la iama universitata urbo Rinteln en la mezo de la bela Wesermontaro feriosemajno, kiun aranĝos la Laborkomunumo de Esperanto-instruistoj de Malsupra Saksujo. La kostoj estas malaltaj: la gastoj nur pagos 6,10 DM po tago por ĉio, la ĝeinstruistoj multe malpli. Do, helpu, ke la afero sukcesos. Oni ĝoje salutas ankaŭ eksterlandanojn. Anoncu vin tuj ĉe Heinrich Müller, Hannover-S, Mommsenstr. 5/I.

Nederlando

● **La estraro de Marista Esperanto-Rondo Internacia (M.E.R.I.)** intencas eldoni specialajn insignojn. Tiuj insignoj konsistos el 15mm alta ankreto kun en la mezo verda steleto, same kiel la emblemo de Marrondo sed sen la savringo kun la vortoj "M.E.R.I.-MARRONDO". La ankreto estos orkolora.

Tiu bela insigno certe valoras esti portata ne nur de maristoj kaj jahtis-

toj (ĉu amatoraj ĉu profesiaj), sed ankaŭ de ĉiuj kiuj simpatias kun la maristoj kaj Marrondo. Ni ja ne forgesu ke la ANKRO estas ankaŭ signo de ESPERO!

Sed la fabriko nur fabrikos la insignojn se sufiĉe granda nombro estas mendata kaj ĝi postulos mendon de almenaŭ 150 ekzempleroj! Tial mi URĜE petas al vi kiel eble plej baldaŭ antaŭmendi la ekzemplerojn kaj samtempe kunsendi la pagon.

La insignoj kostas po / 3,50 (inklude sendkostoj) = U.S. \$ 1,00 = Steloj 14,00. Vi povos pagi per ĉiuj ordinaj manieroj, ankaŭ per U.E.A. al: K. Ruig, P. d. Hoochstraat 50', Amsterdam-Z. Nederl.

● **La Anne Frank Domo en Amsterdamo** eldonis flugfolion en sep lingvoj, el kiuj unu estas Esperanto.

Norvegujo

● **Fondita en 1911, Norvega Esperantista Ligo** festas dum ĉi tiu jaro sian 50-jaran jubileon, kiu estos festata per Jubilea Landa Kunveno en Oslo dum la pentekosto, 20-22 de majo, 1961. Oni esperas vidi ankaŭ eksterlandajn gastojn. Anoncu vin frue al Norvega Esperantista Ligo, Boks 942, Oslo, Norvegujo.

● **"Esperanto por skoltaj"** estas la titolo de lernolibreto multobligite eldonita de Nord-Østerdal Krets av Norsk Speidergutt-Forbund, Alvda, Norvegujo, kaj aĉetebla de la eldonejo. Prezo 1 norv. krono (al eksterlando 0.35 norv. kronoj).

Pollando

● **La eldonaĵo "Eclipsing Binaries Circular"** de la **Eclipsing Binaries Centre** ĉe **Krakova Observatorio** (redaktoro: Dr. Kazimierz Kordylewski; adreso: Kopernika 27, Krakovo) en-

havas alvokon en Esperanto, petantan kunlaboradon de neastronomoj por la observado de eklipsigantaj steloj. Esperantistoj estas petataj sendi al D-ro Kordylewski adresojn de konataj aŭ ili personoj, kiuj (a) loĝas en sudaj landoj; (b) posedas astronomiajn teleskopojn, kaj (c) povus mem fari facilajn astronomiajn observadojn laŭ instrukcioj, aŭ kiuj (d) povus havigi siajn teleskopojn al aliaj amatoroj por tiaj observadoj.

● De septembro 1960 en la ŝtata Pedagogia Liceo N-ro 3 on Vroclavo, s-ano Aleksy Lasinski, redaktoro de la Pola Radio en Wrocław, instruas Esperanton al 39 knabinoj 15-16-jaraj, estontaj polaj instruistinoj.

ESPERANTISTA VIVO

GEEDZIĜOJ

Dumas-Roux. Doktoro Jacky Dumas, kuracisto en Saint-Étienne (Loire), Francujo, edziĝis al f-ino Annie Roux.

Den Haan-Pannicke. La 23an de februaro 1961, en la Urbdomo de Leiden, Nederlando, geedziĝis Adriaan Den Haan, antaŭa kasisto de TEJO, kaj Anita Pannicke el Orienta Germanujo.

NEKROLOGO

Scott. La 2an de januaro, 1961, en sia 88a jaro, mortis subite Russell Scott, Letchworth, Anglujo. Dum multaj jaroj li dediĉis sian tempon, monon kaj intelektajn kapablojn al Esperanto. Dum la dua mondmilito loĝis en lia domo rifuĝintoj el kvin-ses landoj, kies sola komuna lingvo estis Esperanto. Kiam lia pli juna filo mortis en akcidento, li uzis la asekuran monon por eldonigi lernolibron "International Language for Scouts".



46-a Universala Kongreso de Esperanto

Harrogate 5 VIII - 12 VIII 1961 Britujo.

Korespondadreso: 46-a Universala Kongreso de Esperanto - Harrogate. Telefono: Harrogate 4685.

Telegrafo: Esperanto Harrogate.

Banko: Midland Bank Ltd., Harrogate.

Oficiala Antaŭkongreso kaj Seminario "Oriento-Okcidento" (Londono 2-4 Aŭgusto 1961): S-ro Victor Sadler, 1 Poet's Road, Highbury, Londono N. 5.

17-a T.E.J.O.-Kongreso (12-19 Aŭgusto 1961): S-ro T. G. Page, 90 Ross Street, Cambridge.

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 8

marto 1961

Sonbendo:

Mendis la Kongresan Sonbendon por societaj vesperoj jenaj esperantistaj unuiĝoj: Parma (Italujo), Kopenhago (Danlando), Sarpsborg (Norvegujo), Turku (Finnlando), Zürich (Svisujo), Hamburgo kaj Norimbergo (Germanujo), Nemours (Alĝerio), Glasgow kaj Stockport (Britujo), Shinzu (Japanujo), Montpellier (Francujo), Vinkovci (Jugoslavio), Oakville kaj Toronto (Kanado), Los Angeles (Usono), Monte Santo kaj Salvador (Brazilo). Ĝis la 18-a de marto la sonbendo estis mendita de 78 urboj.

Adoptaj Gepatroj:

Jen listo de la unuaj "Adoptaj Gepatroj": S-ro R. W. Hamilton, S-ro A. Edmondson, Esperanto-Grupo Tamworth (ĉiuj el Britujo). La Brita Esperanto-Kongreso 1960 donacis 10 punojn por la celoj de la Fondaĵo.

Loĝado:

Pluraj hoteloj en Harrogate preferas doni nur duonan aŭ plenan pensonon. Por facile solvi la manĝoproblemon dum la Kongresa semajno estas konsilinde mendi duonan aŭ plenan pensonon. Interesuloj bonvolu esprimi tiun deziron pere de la Loĝiga Mendilo en la Dua Bulteno.

Neoficiala Prezento:

La Internacia Arta Teatro ludos en libervola neoficiala aranĝo teatran programon sub la titolo "Unuaktaj modernaj teatraĵoj".

Gazetara Servo:

La Loka Kongresa Komitato nomis S-ron Marinko Ĝivoje el Ljubljana redaktoro de la esperantlingvaj bultenoj de la Kongresa Gazetara Servo.

Sonbenda Programo :

En la kadro de la Arta Festivalo la Loka Kongresa Komitato decidis okazigi prezentadon de la plej bonaj sonbendoj preparitaj de esperantistoj. La sonbendoj devos havi rapidecon 9,5 kaj daŭri ne pli ol 5 minutojn. La temoj devos rilati al la Esperanto-Movado, Arto aŭ Humuro.

Antaŭkongreso :

Aldone al la ekskursa programo, estas aranĝita boatekskurso tra la Havenego de Londono. La veturado okazos ĵaŭdon, la 3-an de Aŭgusto, de la 13,30 ĝis la 18,00 h. kun Esperanta komentario. Mendoj pere de la Antaŭkongresa aliĝilo.

Lumbilda Prelego :

La pianisto Roland Dupuis el Stokholmo prezentos en la kadro de la Arta Festivalo prelegon pri "Renkonto kun la eterna Beethoven", kun piano-ilustraĵoj kaj koloraj diapozitivaj.

Statistiko

(ĝis fino de februaro) Algerio 2, Argentino 2, Aŭstralio 3, Aŭstrujo 11, Belgujo 27, Brazilo 4, Britujo 421, Bulgarujo 3, Danlando 13, Finnlando 6, Francujo 145, Germanujo 63, Hispanujo 5, Hungarujo 4, Irlando 2, Israelo 3, Italujo 46, Japanujo 3, Jugoslavio 39, Kanado 1, Maroko 4, Monako 4, Nederlando 62, Norvegujo 5, Novze-lando 2, Persujo 1, Pollando 15, Portugalujo 11, Svedujo 43, Svisujo 14, Sovetunio 1, Turkujo 1, Usono 5. Entute 981 el 33 landoj (Pasintjare 1057 kongresanoj el 36 landoj).

G. C. Fighiera,

Konstanta Kongresa Sekretario

ARTA FESTIVALO

DEKLAMA BRANĈO

Regularo

1. En la kadro de la Internacia Arta Festivalo okazos programo de deklamado, sub la titolo "Horeto de poezio".
2. Rajtas partopreni ĉiu aliĝinto al la koncerna U.K., kiu estas rekomendita de sia Landa Asocio aŭ alia kompetenta instanco. Anoncante sin, ĉiu partoprenonto devas sendi la skriban rekomendon al la Sekretario de la Deklama Branĉo.
3. Principe ĉiu partoprenonto devas sin anonci al la Sekretario de la Deklama Branĉo ĝis la 1-a de julio. Tamen, se la cirkonstancoj permesas, anoncoj povas esti akceptitaj ankaŭ post tiu dato. Pri la akcepto aŭ neakcepto de malfruaj proponoj decidas la Sekretario.
4. Anoncante sin, la partoprenonto informas la Sekretaron pri la titolo kaj aŭtoro de la deklamota poemo. Se pli ol unu partoprenonto deziras deklami la saman poe-

mon, la pli frua anoncinto havas la rajton ĝin deklami, kaj la pli malfrua(j) devas elekti alian poemon.

5. Ĉiu deklamanto partoprenas per unu verko. Tamen unu verko povas ampleksi pli ol unu poemon, ekz-e sonetserio kiel "Trista tenereco" de Marjorie Boulton estas unu verko. Sed en tia okazo, la unueco de la verko devas esti tute klara, kaj laŭ la intencoj de la aŭtoro.
6. Maksimuma daŭro de unu deklamo estas 5 minutoj.
7. La temoj estas aŭ (a) originala poezio, aŭ (b) tradukoj el poezio de la lando, al kiu apartenas la koncerna deklamonto.
8. Pri eventualaj premioj decidas la L.K.K. En okazo de premiado, la juĝkomisiono konsistas el 3 kompetentuloj, nomitaj de la Estraro laŭ la propono de la Sekretario. La Sekretario rajtas eniri la juĝkomisionon.
9. Principe la partoprenanto deklamas parkere, sed eventuale li rajtas legi sian tekston.
10. La Sekretario, aŭ ties anstataŭanto, prezentas la poemojn al la ĉeestantoj, donante tiujn informojn, kiuj povas aldoni al ilia ĝuo de la koncerna verko.

11. La Sekretario rajtas rifuzi iun partoprenon.

William Auld

Sekretario de la Deklama Branĉo de la Internacia Arta Festivalo
35, Deerpark, Sauchie
Alloa, Clacks, Skotlando

ARTA FESTIVALO

PROGRAMO DE MAGNETOFONAJ SONBENDOJ

En la kadro de la Internacia Arta Festivalo okazos prezentado de sonbendoj senditaj de esperantistoj, laŭ subaj principoj.

1. Ĉiu sonbendo devos atingi la Kongresan Oficejon plej malfrue ĝis la 30-a de junio 1961.
2. Ĉiu sonbendo devos havi la rapidecon 9,5.
3. La alsenditaj sonbendoj restos propraĵo de L.K.K., kiu rajtos kopii kaj uzi ilin laŭ sia bontrovo. La sonbendoj ne estos resenditaj.
4. L.K.K. ne akceptas respondecon pri eventuala perdo aŭ difektiĝo de la sonbendoj.
5. El la ricevitaj bendoj L.K.K. elektos la plej taŭgajn por prezentado dum la sonbenda programo.
6. La sonbendoj ne devas daŭri pli ol 5 minutojn kaj devas pritrakti jenajn temojn :

Seminario por Ĉe-metodaj instruistoj

en la kadro de la 46-a Universala Kongreso de Esperanto
Harrogate (Anglujo,) 6-11 aŭgusto 1961

Fariĝis preskaŭ tradicio okazigi seminarion por Ĉe-metodaj instruistoj de Esperanto en kunligo kun la Universalaj Kongresoj de Esperanto, sed nun por la unua fojo ĝi okazos ne antaŭ, sed *dum la kongreso*. Ni faris ĉi tiun ŝanĝon por ŝpari al la partoprenantoj la ekstrajn kostojn de loĝo kaj manĝo en la kongresurbo, kaj ankaŭ por ebligi ŝparon en la vojaĝkostoj al tiuj, kiuj intencas aliĝi al kongreskaravano.

Supozante, ke la seminarioj de s-ro Andreo Ĉe jam estas sufiĉe konataj, ni tamen volas aldoni por tiuj, kiuj ne legas multajn Esperanto-gazetojn, ke dum la seminario s-ro Ĉe prezentas la ĉefajn kaj plej karakterizajn partojn de sia kurso por komencantoj, donas informojn kaj klarigojn pri la metodo kaj konsilojn pri la organizo kaj gvidado de la kursoj. La seminario estas destinita por tiaj personoj, kiuj jam scias la lingvon kaj intencas mem instrui ĝin laŭ tiu metodo.

La lecionoj de la seminario okazos dum 15 horoj en kvin tagoj de la kongresa semajno (dimanĉo, lundo, mardo, merkredo kaj vendredo) kaj tiel, ke ili ne estos samtempaj kun la wefaj kon-

gresaj aranĝoj, por ke la seminarianoj povu ĉeesti ĉiujn gravajn kunvenojn, festojn, ekskursojn k.t.p. La horaro de la lecionoj troviĝos en la definitiva programo de la kongreso. Ĉiu seminariano ricevos ateston pri la partopreno.

La ejo de la seminario estos en la *urbodomo de Harrogate* la salono por la kunvenoj de la urba konsilantaro. La konstruaĵo staras vidalvide al la ĉefa Kongresejo, en la plena koro de la urbo.

La kotizo por la seminario estas 32 steloj (16 ŝilingoj). Britoj povas pagi ĝin al : S-ro Harry W. Holmes O.B.E., 38 Fillebrook Road, London E 11. Aliaj pagu al la Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando, aŭ al la landaj reprezentantoj de *Universala Ligo*. La aliĝon samtempe kun la pago, oni sciigu al la Int. Esp.-Instituto en Hago.

Urĝa peto. — Bonvolu ne prokrastivan aliĝon, por ke ni povu fari ĝustatempe la necesajn preparojn laŭ la nombro de la partoprenantoj kaj jam antaŭe pretigi la atestojn.

JULIA ISBRUCKER

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM-2 NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

la 1-an de aprilo 1961

N-ro 337

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de marto kaj ankaŭ por komparo je la fino de marto 1960.

	1960	1961
Asociaj membroj	5059	4505
Individuaj membroj		
MJ	611	600
MA	4065	4002
MS	468	409
Pat.	3	1
DM	349	407
HM	40	43
JMJ	20	17
JMA	148	113
	<u>5704</u>	<u>5592</u>
	<u>10.763</u>	<u>10.097</u>

DELEGITOJ

Brazilo

Rio de Janeiro (Guanabara) FD (radioamatorismo): S-ro L. C. Nunes D'Angelo, ĵurnalisto, Ferreira de Andrade no. 504.

Britujo

Bridlington (Yorkshire) FD (turismo): S-ro N. Booth, hotelestro, "St. Healers", 68, Windsor Crescent.

Henley-on-Thames (Oxfordshire) D: S-ro D. G. Lee, loka registrara ofisto, 45 Northfield End.
FD: (junulargastejoj) la D.

Finnlando

Kouvola (Kymen lääni) VD: S-ino Anna-Liisa Pohjalainen, Valtakatu 12 as. 13.

Francujo

Le Vesinet (S. et O.) FD: (laboristaj aferoj) S-ro S. Arnaiz, komerc-laboristo, 17 avenue Georges Bizet.

Svedujo

Lund (Skane) JD: vakas. La D restas; nia informo en la februara numero estis preseraro!

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1961

242. Machado, S-ino I. dos Santos, Rio de Janeiro, Brazilo, 243. Melo, S-ro A., Goiania, Brazilo, 244. Nogueira, S-ro W. J., Rio de Janeiro, Brazilo, 245. Nunes, D-ro E. Pereira, São Paulo, 246. Oliveira, S-ro L. J. de, Santos, Brazilo, 247. Padua, Gel. G., Belo Horizonte, Brazilo, 248. Pauluk, S-ro J., Londrina, Brazilo, 249. Peccioli, S-ro I., Jaú, Brazilo, 250. Peixoto, S-ro O., Niteroi, Brazilo, 251. Pinto, S-ro J. D., Santo André, Brazilo, 252. Przewdowski, S-ro R., São Leopoldo, Brazilo, 253. Rezende, D-ro C., Belo Horizonte, Brazilo, 254. Santos, Prof. M. J. dos, Rio de Janeiro, Brazilo, 255. Santos, S-ino Z. C., Teofilo Otoni, Brazilo, 256. Silva, S-ro A.D. da, Rio de Janeiro, Brazilo, 257. Souza, S-ro D. Pe-

reira de, Rio de Janeiro, Brazilo; 258. Souza, S-ro J. Bat, de Melo e, Ipanema, Brazilo; 259. Souza, S-ro N. Pereira de, Rio de Janeiro, Brazilo; 260. Souza, S-ro O. C. de, Itabuna, Brazilo; 261. Teixeira, S-ino L., Rio de Janeiro, Brazilo; 262. Valevski, S-ro I.C., São Paulo, Brazilo; 263. Vaz, S-ro A.J. Rio de Janeiro, Brazilo; 264. Verde, D-ro D. L., Ceará, Brazilo; 265. Viana, D-ro L.M., Belo Horizonte, Brazilo; 266. Wehrs, F-ino E., Niteroi, Brazilo; 267. Atkinson, S-ro W.G., Worcester Park, Britujo; 268. Bachmann, S-ro S. P., Hove, Britujo; 269. Barnett, S-ro L.H., Ilford, Britujo; 270. Beaumont, S-ro B.B., Fartown, Britujo; 271. Higham, S-ro W. H., Southport, Britujo; 272. Lewin, S-ro M., Dunstable, Britujo; 273. Phelan, S-ro H.K., Old Bexley, Britujo; 274. Seddon, S-ino R. Southport, Britujo; 275. Sly, S-ro K.A. Letchworth, Britujo; 276. Williams, S-ro N. Manchester, Britujo; 277. Zeiner, S-ro B.R., Barry, Britujo; 278. Jørgensen, S-ino A., Brønshøj, Danlando; 279. Lange, S-ro O.C., Hvidovre, Danlando; 280. Danlando; 280. Pedersen, S-ro J., Kolding, Danlando; 291. Rude, S-ro V., Stenlille, Danlando; 282. Schleicher, S-ro Ib. København. Danlando; 283. Narvala, S-ro N.G., Käpylä, Finnlando; 294. Groupe T.S.C., Télémécanique, Nanterre, Francujo; 285. Beliard, S-ro L., Nantes, Francujo; 285. Beliard, S-ro L., Nantes, Francujo; 286. Borel, S-ino, Arles, Francujo; 297. Delahaye, S-ro I., Petitville, par Carentan, Francujo; 288. Lemonnier, F-ino G., Asnières, Francujo; 299. Llech-Walter, S-ro R., Perpignan, Francujo; 290. Llorens, S-ro R., Montélimar, Francujo; 291. Berger, S-ro J.G. München, D-ro J., Bonn, Germanujo; 294. Sandroek, S-ro O., Essen, Germanujo; 295. Cirkulo Mercantil, Málaga, Hispanujo; 296. Herranz, S-ro R. Palacios, Bilbao, Hispanujo; 297. Bonomi, S-ro P.A., Verona, Italujo; 298. Dogliani, S-ro C., Torino, Italujo; 299. Lacalendola, S-ro Prof. A., Bari, Italujo; 300. Minnaja, S-ro L., Roma, Italujo; 301. Zacchè, S-ro F., Montova, Italujo; 302. Archell, S-ro R.S., Ville

1. Esperanto-Movado

- Kial ĉeesti Universalan Kongreson
- Defendo de Esperanto (respondo al unu antaŭjuĝo kontraŭ Esperanto)
- Kiel organizi grupan vesperon
 - prelego pri spertoj kaj metodoj
 - disaŭdigo de sukcesinta programo
- Laŭ bontrovo de la partoprenanto

2. Arto

- Vortoj kaj Muziko
- Laŭtleĝo de literatura teksto
- Sonoj de la naturo
- Laŭ bontrovo de la partoprenanto

3. Humuro

- Laŭ bontrovo de la partoprenanto

RADIO

Ciujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Por tempoj kaj ondlongoj vidu la oktobran numeron.

Radio Roma. 2-V, Tra la literaturo; 5-V, Antonio Meucci kaj la telefono; 9-V, Novaĵoj el Italujo; 12-V, Leterkesto kaj bibliografio; 16-V, Italaj kanzonoj en Esperanto; 19-V, La tago de bonvolo; 23-V, "Pentekosto", religia himno de A. Manzoni; 26-V, Granda sanktulo Sankta Filipo Neri; 30-V, Italujo kaj fremda historiisto T. Mommsen. Krome, ĉiun merkredon, Kuriero de Esperanto.

Svisa Radio. Dissendoj de la 7-a de majo ĝis la 4-a de Novembro laŭ la jena programo: lunde kaj merkrede je 12.20 per ondoj 48.66 m. kaj 31.46 m.; ĵaŭde kaj sabate je 21.15 per ondoj 48.66 m., 31.46 m. kaj 25.61 m. Parolantoj: D-ro Baur lunde kaj ĵaŭde kaj D-ro Privat merkrede kaj sabate.

Franca Radio respondas esperantlingve en la ĉiutaga mallongonda programo dediĉita al Sovet-Unio de 20.00 ĝis 21.00. Logantoj de tiu lando skribu en Esperanto pri iu temo rilatanta al Francujo al: R.T.F., Emissions vers l'étranger, Section U.R.S.S., 118 Champs Elysées, Paris (8^o).

Lasalle, Kanado; 303. Collins, S-ro E., Toronto. Kanado; 304. Joly, S-ro R., Dolisie, Kongo (eks-fr.); 305. Bourgeois, S-ro M., Tananarive, Madagaskaro; 306. Rousseau, S-ro H., Tananarive, Madagaskaro; 307. Jung, S-ro T., Scheveningen, Nederlando; 308. Themaat, S-ro A. Verloren van, Amsterdam, Nederlando; 309. Woessink, S-ro E.J., Arnhem, Nederlando; 310. Bugge-Paulsen, S-ro Kapt. R., Oslo, Norvegujo; 311. Engen, S-ro P., Drammen, Norvegujo; 312. Rego, S-ro M. Lopes do, Lisboa, Portugalujo; 313. Andersson, S-ro L. Hoje, Svedujo; 314. J. N. Rochester, Aŭstralio; 315. Fingalsson, S-ro B., Gisebo, Svedujo; 316. Gerdman, S-ro B., Stockholm, Svedujo; 317. Karlsson, S-ro H., Kisa, Svedujo; 318. Karlsson, F-ino H., Klippan, Svedujo; 319. Lindberg, S-ro F. Åmål, Svedujo; 320. Lundgren, S-ro R., Uppsala, Svedujo; 321. Lundin, S-ro Ing. H., Örebro, Svedujo; 322. Persson, S-ro L. Häradsbygden, Svedujo; 323. Stenström, S-ro J. Jonköping, Svedujo; 324. Blackstone, S-ro R., Orlovista, Usono; 325. Eisele, S-ro J., St. Louise Usono; 326. Gould, S-ro W.H., Springfield, Usono; 327. Hoffman, S-ro D.W., Jersey Sitj, Usono;

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Garraway, F-ino E., Sheffield, Britujo;
Stenberg, S-ro Adj. M., Lycksele, Svedujo.

FONDAJO PROF. CANUTO

Antaŭa stato: 100 MA, 19 MJ, 1 J-MJ kaj 1 J-MA.

Esp. Brusela Grupo, Belgujo, 1 MA kaj 1 MJ; S-ino Fighiera, Britujo, 2 MA; S-ro J. Windisch, Germanujo, 1 MA; S-ino A. Mangili-Tosi, Italujo, 1 MJ; Prof. I. Piatti, Italujo, 1 MJ; S-ro J. Andzans, Sovetunio, 1 MA; S-ro I. S. Cins, Sovetunio, 1 J-MJ; S-ro A. Carlén, Svedujo, 2 MA kaj 1 MJ.

Entute: 107 MA, 23 MJ, 2 J-MJ kaj 1 J-MA.

Ĉiuj kontribuu por membrigi esperantistojn en nepagipovaj landoj, honore al la nobla prezidinto de U.E.A. (Vidu dec. no. "Esperanto", 1960).

FONDAJO ZAMENHOF

Antaŭa sumo: 18.590, 96 gld.

S-ro I. S. Cins, Sovetunio, gld. 3,—.

Entute: 18.593,96 gld. je 1.4.1961.

Daŭrigu vian kontribuadon por subteni la plian agadon de la Asocio, por firmigi la poziciojn akiritajn dum la Zamenhof-Jaro!

DONACOJ AL A.P.O.

S-ro J. W. Chambers, Britujo, 22,22 gld.; S-ro A. Criach, Hispanujo, 10,— gld.; S-ro M. Martin, Hispanujo, 1,20 gld.; S-ro Tortel, Francujo, 7,70 gld.; S-ino K. Olsson, Svedujo, 35,— gld.

S-ro F. Garcia Blazquez Venezuelo, gld. 18,15.

DONAĈOJ AL ĜENERALA KASO

S-ro J. Kosutek, Aŭstralio, 14,— gld.; S-ro R. Pawlik, Aŭstrujo, 1,74 gld.; S-ro H. Davies, Britujo, 21,16 gld.; S-ro E. J. Laurie, Britujo, 15,87 gld.; "X", Danlando, 24,25 gld.; "X", Danlando, 37,25 gld.; D-ro Ing. Fr. Seidel, Germanujo, 1,80 gld.; S-ro J. Wolff, Germanujo, 5,79 gld.; S-ro M. Martín, Hispanujo, 1,20 gld.; S-ro J. Ventura, Hispanujo, 3,75 gld.; S-ro Th. Thorsteinsson, Islando, 2,— gld.; S-ro S. R. Docal, Usono, 14,14 gld.; S-ro B. Reich, Usono, 18,85 gld.; S-ro B. Van Hill, Usono, 3,77 gld.

S-ino A. Concelaar, Germanujo, gld. 3,65; F-ino Ch. Ostertag, Germanujo, gld. 6,39; S-ro A. M. Bryo, Usono, gld. 36,12; S-ro J. F. Culverwell, Usono, gld. 10,89.,

Al ĉiuj donancintoj tre koran dankon.
M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

KOREKTO

Ni atentigas pri eraro en la teksto de la tutpaĝa reklamo de STAFETO, dorsflanke de la aprila numero 1961 de Esperanto. La 4-a titolo en la listo de aperontaj verkoj ne estos "La Aspektoj de Esperanto", sed "LA ZAMENHOFA ESPERANTO". Krome, al la nomoj de la kontribuintoj aldoniĝas tiuj de Sonnenfeld kaj Schwartz.

ANONCETOJ

AVERTO! Nek la redakcio, nek UEA iel ajn respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, aŭ pri plenumado de promesoj faritaj en ili. Tio aparte koncernas poŝtmarkkolektantojn.

Antaŭ Harrogate - Londono! Oficiala Antaŭkongreso kaj Seminario "Oriento-Okcidento". Prospekton petu de S-ro V. Sadler, 1 Poet's Road, Highbury, LONDON, N. 5. Ne prokrastu!

Avri Salamon, QIRYAT-MOTZKIN, P.B.O. 8 (Israelo) ofertas diverslandajn alumetskatoletikedojn kontraŭ poŝtmarkoj. Aŭfranku filatele!

Serĉas kontakton kun seriozaj filatelistoj tutmonde. Celo: poŝtmarkinterŝanĝo (prefere flaŭro kaj faŭno). Ljubomir Leviĉarov, Jurdan Nenov 11-A, Pazargik, Bulgarujo.

Petas ĉiajn esperantaĵojn por ekspozicio. Nepra respondo. Geedzoj Kalkman, Schoutstraat 19, Vlaardingen, Nederlando.

24-jara ĉeĥa teknikisto deziras korespondi tutmonde, interŝanĝi poŝtmarkojn, bildkartojn, alumetetiketojn kaj simile. Ĉiu letero respondota! Alois Jakubec, DRAHOTUŠE 61, Ĉeĥoslovakio.

Turismo -Komerca Oficejo deziras

ricevi el ĉiu lando turismajn kaj komercajn flugfoliojn aŭ broŝurojn, se eble po kvanto. J. Puig Rodón, 25 Mayo 1446, Tucumán, Argentino.

"Per la mono kiun ĝi elspezas en unu jaro ferianta, amuziĝanta, la esperantistaro povus aĉeti finan venkon", asertas D. Soleo, 14 B Castle Avenue, Dover, Britujo.

Grafologo deziras korespondi kun fakuloj kaj interesuloj pri grafologio kaj juĝa manskribkomparo en tuta mondo. Dr. Horst Bitterling, (13 b) München 23, Cherubinistr. 3.

Venelin Jeleu, 17-jara, lernanto, str. Marica 24, Ajtos, Bulgario, pri muziko; interŝ. PM. PK.

Nils Gustafson, Hällabrottet, Svedujo, sendas saluton al sekvantaj gesamideanoj, kiuj afable helpis al li kaj kunuloj dum vojaĝo de Svedujo al Afriko 1951. Nur ilia helpo ebligis tiun belan kaj interesan vojaĝon: Erik Carlén, Hällabrottet; Bertil Carlén, Hällabrottet; E. Jacobs, Flensburg; Peter Becker, Mainz-Weissnau; H. Dabiezies, Paris; H. Bourdelon, Marseille; F. Knecht, Casablanca; B. S. Ohana, Marrakech; Francisko Malalta, Genova; Ermano Filippi, Roma; Giovanni Saggiori, Padova; Quarone Giuseppe, Milano; Lina Marthaler, Asceno; Paul Enz, Zürich; C. Barthel, Frankfurt; A. Messmer, Frankfurt.

Grupo de pedagogoj kaj studentoj de pedagogia instituto ĝojus kunligi kun samprofesiaj diverslandaj: Moskvo G-34, M. Levsinskij per 1. Dom Uĉitela Funyo-regiono, Rondo de Esperanto.

Mi serĉas por kolektado 1e) esperantistojn p.m. kaj poŝtaĵojn 2e) belajn turismo- kaj propagandafiŝojn el ĉiuj landoj. D-ro Pierre Berlot, Tour Centrale, Place Colbert, Mont-Saint-Aignan (Seine-Maritime) Francujo.

Okaze de la 53a Nacia Kongreso de Esperanto en Epernay la 20-21-22 de majo, la loka grupo eldonos ilustritan filatelan poŝtkarton dediĉotan al pioniroj de nia movado. Prezo po unu: 2 internaciaj respondkuponoj. La Eksterlandaj Esperantistoj estas senpage akceptitaj dum tiuj tri tagoj. Informoj haveblaj ĉe: S-ro Debar Serge, Fakdelegito U.E.A. 38, rue des Petis Près, Epernay, (Marne), Francujo.

S-ano Stanura, Ĉkalov 863, Ostrava-Poruba (Ĉeĥoslovakio) serĉas kontakton kun stenografoj en Irlando, Islando, Turkio kaj en landaj ekster Eŭropo. Korespondas en Esperanto, germana kaj angla.

Ing. Evgenij Nikitin, B.P.7, Kiŝinev-centro, USSR, deziras interŝanĝi librojn en diversaj lingvoj kaj poŝtkartformatajn reproduktaĵojn.

Moderna lernolibro de Esperanto

por la tuta mondo

Vilho Setälä :

Privilegia Vojo

al lingvoscio : Esperanto

Prezo 10 steloj + sendkosto

Kuneldoninto por la landoj ekster Finnlando kaj
Svedujo : U.E.A., Eendrachtsweg 7, Rotterdam.

Unua kaj unika libro pri fiŝoj en Esperantujo

Sekretoj de la Marestaĵoj

de Petar Giunio
reverkita de Lic. Marinko Givoje
eldonita sub aŭspicioj de UEA

Prezo : 5.— gld., 20 steloj.

El ĉiuj landoj kiuj povas pagi al Okcident-Eŭropo
mendu pogrande kaj podetale ĉe U.E.A., Een-
drachtsweg 7, Rotterdam, Nederlando.

MEMORLIBRO

pri la Zamenhof-Jaro

Ĉu vi jam havas ĝin? Donacu ĝin en ĉiuj okazoj
en kiuj vi deziras ion donaci al esperantisto!

Prezo : 12,50 gld.; 50 steloj.

FERIAJ KULTUR-SEMAJNOJ

Esperanto kaj Geonismo

Kastelo MÜNCHENWILER

apud MURTEN - MORAT, Svislando

6-20 aŭgusto 1961

Dir. : D-ro W. Perrenoud, Prof.

Prospekto kaj informoj : Svisa Esperanto-Instituto
Breitenrainstrasse 12, BERN.

Helsingör

invitas vin al siaj internaciaj feriaj Esp-kur-
soj (perfektiga, konversacia kaj prepara kurso
por Cseh-metodaj instruantoj) 23. - 30. de
julio 1961. Petu senpagan programon ĉe

L. Friis,
Ingemannsvej 9,
Aabyhøj, Danlando.

ARTISTAJ AMATOROJ

Ĉu vi partoprenos la kongreson en Harrogate ?
Se jes, nepre vin interesas la jena alvoko. Kiel por
Bologna en 1955 respondecos la subskribanto pri
arta programo, la amatora vespero de la 46-a U.K.
en Harrogate : vendrede 11. aŭg. je 18.00.

Ĝojante pri tiu okazo denove elmontri kaj en kaj
iomete ekster nia movado la valoron de nia lingvo
sur vere kultura kampo, mi forte admonas la ĉi-
jarajn kunlaboremajn mondkongresanojn, kiel ajn
modestaj ili sin sentas, urĝe sin anonci al mi por
detala aranĝado : danco, deklamo, aktorado, ĥor-
kaj sol-kanto, instrumentludo.

Ĉiuj program-eroj estas nun en preparo sed por
ke la rezulto estu laŭ nia ambicio, ni ankoraŭ
bezonas multajn partoprenantojn.

Kiel vi konstatos, nin helpas granduloj de la Muzik-
mondo : Beethoven, Chopin, Franz Liszt, k.t.p....
Sed ni ankaŭ helpu nin mem kaj nin montru indaj
elvoki tiujn famulojn en nia ĉi-jara festo.

Mi atendas vian kuraĝigan aliĝon kaj pro tio
sincere antaŭdankas.

..... Per flugiloj de muzika vento !.....

Roland DUPUIS

Helgagatan, 36, uppg. 13, n.b.

STOCKHOLM-Sö

Svedujo.

FERMENTARIO

Rilate al tiu ĉi grava verko de la urugvaja pensisto
Carlos Vaz Ferreira, lastjare aperinta en Esperanto-
traduko, estu notite, ke oni povas libere represi
kaj traduki iun ajn parton de la verko en gazetoj
kaj revuoj, sed oni citu la fonton kaj oni bonvolu
sendi almenaŭ unu ekzempleron de la koncerna
numero al la tradukinto : Prof. M. Fernández
Menéndez, calle 21 de Setiembre, 2405, piso 1º,
ap. 11. MONTEVIDEO (Urugvajo).

La Nederlanda Ligo de Instruistoj en la Kulinaraj Profesioj

(bakistoj, kuiristoj k.t.p.) serĉas korespondantojn
en ĉiuj landoj, por interŝanĝi :
receptojn kaj bildojn de produktoj, opiniojn pri
labor- kaj instrumentadoj.

Eventualaj reciprokaj vizitoj.

Leteroj al la sekretario O. Hoekstra, Frederiks-
laan 47, Schoorl, Nederlando.

La multe atendata faka revuo esperantista

La kolektanto Internacia

ekkomencos aperadi la 1-an de julio 1961 en bela multkolora, riĉe ilustrita formo je utilo kaj bezono de filatelistoj kaj aliaj diversspecaj kolektantoj.

Jarabono : 2,5 us. dol. aŭ egalvaloro en alia valuto. Pagoj en pm. akceptataj nur en kompletaj neuzitaj memorigaj (motivaj) serioj.

Anoncetoj : pri korespondado kaj interŝanĝo 0,75 us. dol. aŭ egalvaloro por minimumo ĝis 25 vortoj aŭ mallongigoj. Por ĉiu plia vorto aŭ mallongigo ankoraŭ 3 cendoj.

Reklamoj-ofertoj je paĝo 32 us. dol.
Senpaga prospekto liveribla !

Adreso : La kolektanto internacia
LJUBLJANA, poŝtkesto 239 "Esperanto"
Jugoslavio.



FILATELISTOJ- KOLEKTANTOJ

Okaze de la 55-a jarkongreso de S.E.F. pentekoste 1961 en Linköping Svedujo la Reĝa Poŝta Direkcio aranĝos poŝtekspedejon kun speciala stampo en la kongresejo dum la tagoj 20, 21 kaj 22-a de majo 1961.

Se vi volas la stampojn sur speciala poŝtkarto kun kongresa marko, sendu unu internacian respond-kuponon po ĉiu stampo kaj al vi mem adresitan paperstrion (1 po serio) en letero al la adreso :

Esperanto-Kongreso de S.E.F. 1961,
Poŝta fako 2111, **Linköping**, Svedujo.

Konsiderinde reduktitaj prezoj por la Libroj

Biografio Tito	1.80 US dol.
Esperanto kaj lernejo	1.25 „ „
Tri Satiroj	0.25 „ „
Kvar Prelegoj pri E. Literaturo	
(D. Kralj)	0.90 „ „
Panjo (trad. J. Korinek) J. Seifert	1.00 „ „
Kavo (trad. Vanĉik) G. Kovaĉič	1.00 „ „

Porinfana literaturo (koloro ilustr. rakontoj)

Ŝtelita Lampo, bind.	0.60 „ „
Mojca Etulino, broŝ.	0.25 „ „
Varma Rivereto, bind.	0.50 „ „
Varma Rivereto, broŝ.	0.25 „ „

ktp. ktp.

Kompleta prospekto senpage
Libroj mendeblaj ankaŭ ĉe UEA
Rotterdam

Slovenia Esperanto - Ligo
Eldona Sekcio, Ljubljana poŝtfako 239

La Suda Stelo - Prometeo

Internacia Revuo pri sociaj, kulturaj literaturaj
Jarkolektoj riceveblaj :

Bibliografio, Verda Paletro, Portretoj ktp.
Jarkolektoj riceveblaj :

1959 kaj 1960 po 1 US dol. aŭ egalvaloro
duontole binditaj kun

ora surpriso 1.5 US dol. aŭ egalvaloro

Jarabono por 1961 1.5 US dol. aŭ egalvaloro

Aperos kvaronjare (4 n-roj). Prospekto senpage
liveribla. Perantoj en ĉiuj landoj.

LA SUDA STELO - PROMETEO
Ljubljana, poŝtfako 239

STAFETO

Eld. J. Régulo

**Famo ne flugas, se kaŭzo ne estas !
Sep titoloj de STAFETO jam elĉerpigis !**

Nun disponeblaj titoloj :

- Ch. Baudelaire : **La floroj de l'malbono**, trd. de **K. KALOCSAY** kaj **G. WARINGHIEN**, 400 p.
- J. D. APPLEBAUM** : **Jozefo**. 120 paĝoj.
- Esperanta Antologio. Poemoj 1887-1957**. Redakto de **WILLIAM AULD**, 648 p.
- J. BAGHY** : **Sonĝe sub pomarbo**. 232 p.
- M. BOULTON** : **Eroj kaj aliaj poemoj**. 368 p.
- Sofoklo : **Reĝo Edipo kaj Antigona**. Traduko de **D. B. GREGOR**. 216 p.
- M. Pagnol : **Topaze**; Ch. Vildrac : **La ŝipego "Tenacity"**. Trad. de **R. BERNARD**, 292 p.
- W. Shakespeare : **Otelo**. Traduko de **RETO ROSSETTI**. 208 p.
- Internacia Teatro** (Vidu anoncon sur p. 100 de la 1960-Jarlibro). **Presata**.
- P. NEERGAARD** : **La vivo de la plantoj**. 128 paĝoj, ilustrita.
- T. SEKELJ** : **Nepalo malfermas la pordon**. 216 plus 10 paĝoj, ilustrita.
- L. TELL** : **La bela subtera mondo**. 96 plus 24 paĝoj, ilustrita.
- B. RAGNARSSON** : **Ŝtupoj sen nomo**. 128 paĝoj. Dekoracioj de **PICASSO**.
- P. ROSSETTI** : **Pinta krajono**. 136 paĝoj. Dekoracioj de **KLEE**.
- E. URBANOVÁ** : **Nurtri kolorojn**. 140 paĝoj. Dekoracioj de **OBERTHOR**.
- J. FRANCIS** : **Vitralo**. 136 paĝoj.
- E. PRIVAT** : **Junaĝa verkaro**. 144 paĝoj.
- W. AULD** : **Unufingraj melodioj**. 128 paĝoj. Dekoracioj de **YOUNG**.
- REEĤOJ** : **Jugoslavia poemaro**. ĉ. 126 paĝoj (**Presata**).
- E. DE KOCK** : **Ombroj de la kvara dimensio**. ĉ. 140 paĝoj (**Presata**).
- G. WARINGHIEN** : **Lingvo kaj vivo. Esperantologiaj eseoj**. 452 p.

Kunhelpu pluporti la torĉon!

Ĉiujn titolojn liveras la libroservo de U. E. A.!